

Nia Gazeto

Direktoro: Georges AVRIL

MONATA ELONO DE « L'ÉCLAIREUR DE NICE ET DU SUD-EST »

Cefredaktoro: S. GRENKAMP-KORNFELD

Cefkuntlaborantoj: Prof. W.E. COLLINSON (Britujo). — C. AYMONIER; d-ro BRIQUET; d-ro CORRET; prof. COTTON, membro de l'Instituto; prof. DEJEAN; ERA; L.LEONTIN; prof. VANVERTS (Francujo). — JAUME GHAU CASAS (Hispanujo). — JULIO BAGHY (Hungarujo). — CAN-SO-LIN (Ĥinujo). — Prof. Bruno MIGLIORINI; d-ro ELIO MIGLIORINI (Italujo). — I. ROTKYIC (Jugoslavio). — F-ino LIDJA ZAMENHOF; prof d-ro O. BUJWID; I. LEJZEROWICZ; F.A. FRENDEL (Polujo). — Prof. P. BOVET (Svisujo)

REDAKCIO
ADMINISTRACIO
NICE (Francujo)
29, Avenue de la Victoire

Arabono: Francujo, frfk 10 (svfk 2); landoj aliĝintaj al la konvencio de Stockholm, frfk 12 (svfk 2,40); aliaj landoj, frfk 15 (svfk 3).
Anoncoj: unucentimetra kolonero (67 m/m larĝa) kostas frfk 5 (svfk 1). Anoncoj pri korespondado, intersanĝo, ktp. kostas frfk 2,50 (svfk 0,50) por tri linioj. Poŝtĉeka konto: Marseille n° 263-74, Eclairer.

LA INTERNACIA CSEH-INSTITUTO de LIDJA ZAMENHOF

En unu bela tago la oficistaro de telegraficejo en Hago mutigis pro surprizo: sur telegrafa ŝlipo, entenanta la sendotan tekston, figuris la jena frazeto: «Sendu cent elefantojn». La telegrafistaro estis tiom prudenta, ke antaŭ ol telegrafi tiun iom neordinaran tekston, ĝi kontrolis ĉe la adresinto, ĉu ne enŝteligis la eraro. La adresinto, kiu estis la Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, plene konfirmis la strangan tekston. Jes, ĝi mendis cent elefantojn.

Sed nun, kara leganto, ne terurigu via-vice. La elefantoj ne estis pezaj bestoj el Hindujo aŭ Afriko; ili estis tute maldikaj, sed blovdikigebaj kaŭĉukaj ludiloj, kiuj sategas ĉiuj infanoj de la mondo, kaj kiujn same sategas ankaŭ la plenkreskuloj, salutantaj ilin kun infana gojo, kiam ili aperas subite kaj surprize en la mano de Cseh-instruisto.

Kio estas la Cseh-metodo, pri tio mi nun ne parolos. Tion ĉi ne scias nur tiuj, kiuj vole ignoras ĝin. Kreis ĝin antaŭ jaroj nekoniata pastro, Andreo Cseh. Placis la metodo, placis la instruisto, kiu baldaŭ ĉesis esti nekoniata kaj komencis migri tra landoj, por senlace kaj senkompare instrui la belan lingvon de Phomaro. Kaj baldaŭ li trovis imitantojn kaj baldaŭ invitoj komencis venadi are el diversaj flankoj, kaj baldaŭ iĝis neeble respondi al ĉiuj invitoj.


Prezentu al vi embarason de esperantista grupo, kiu, aŭdinte pri la bonegaj rezultoj de la Cseh-kurso, ekdeziris aranĝi tian kurson en sia urbo. Ili disponas belan ĉambron, ili havas bonegan nigran tabulon — sed nun venas la demando: kiu gvidos la kurson? Embarasite la estraranoj rigardas unu la alian, fine unu diras: «Mi havigos al mi notojn pri la kurso kaj mi instruos laŭ ili.»

Dirite — farite. Sed kiel farite? La instruanto konas la metodon nur laŭ notoj aŭ stenografita teksto, kio povas doni al li nenian ideon pri la vera spirito, en kiu oni devas gvidi la Cseh-kurson, kaj lia laboro estas kvazaŭ danco de urso. Vidante malsukceson, li forlasas la metodon; li opinias ĝin malfacila. Ankaŭ la opinio de la grupa estraro pri la metodo estas jam nun fiksita.

Okazas ankaŭ alimaniere: Samideano, kiu partoprenis Cseh-kurson, revenas hejmen kaj penas transplanti la metodon sur la hejman grundon. Li arigas lernantojn, komencas la kurson. Li estas bona esperantisto, li ankaŭ zorge antaŭ-preparas ĉiun lecionon. La kurso okazas en agrabla atmosfero. La lernantoj bele progresas, kaj, kontraŭ la kutimo, ne forlasas la kurson en la mezo. Tamen la grupa estraro ne estas ankoraŭ kontenta. Jes, la kurso sukcesis. Sed ĉu tio estis la sukceso? Kie estas tiuj «centoj da lernantoj», kie estas «la ĝenerala intereso», kie estas «la nova epoko de la movado en nia urbo?» Bhaaago...

Sed jen la tria maniero: la grupa estraro decidis inviti fremdlandan instruiston. La ĵurnalistoj, kiuj emas ignori siajn samlandanojn, interesigas nun por la entrepreno. Ili favore enpresigas alsenditajn artikolojn, ili akceptas la fremdulon en siaj redakcioj, ili eĉ bonvolas veni al la provleciono kaj poste aperigas en siaj gazetoj favorajn raportojn. Same interesigas la publiko. Oni venas al la inaŭguro, por vidi, kiel «aspektas» tiu fremdlandano. Gravas

ke la homoj venis. Sorĉi ilin, ke ili restu ankaŭ por la kurso, estas jam la tasko de la instruisto. Cetere ili restas tiom pli volonte, ke en la fundo de la animo ili sciolas, ĉu efektive oni povas en tiu ĉi lingvo interkompreniĝi kun alilandano. Ili gojas kaj entuziasmo estas grandaj, kiam la kurso sperto donas al tiu ĉi de-



ARNHEM: ESPERANTO-DOMO

mando plene jesan respondon. Ĉi tiu sperto estas neebila, se la instruanto estas samlingvano de la lernantoj.

Ĉiuj tiuj konsideroj kaŭzas, ke dezirante organizi grandskale kaj sukcese Cseh-kurson, oni devas serĉi fremdlandan instruiston. Sed kiel serĉi lin? Eble per gazetaj anoncoj? Respondo sendube venus — sed kiu estus la respondanto? Kiu garantius, ke li efektive konas la metodon, ke li havas talenton, sperton, ke li havas ĉiujn kvalitojn, postulatajn de speciale invitata instruisto? Kiu garantius, ke li simple ne fuŝos la laboron kaj, anstataŭ sukceso, ne alportos al la loka movado baton?

Tiuj kaj similaj demandoj, komencas disaj kaj apartaj, iom post iom oftiĝis. Oni sentis bezonon de iu centro, kiu ludus la rolon de peranto inter la instruistoj kaj la kursorganizantoj. Sub la premo de tiu bezono fondiĝis en Hago, en majo 1930, la Internacia Cseh-Instituto de Esperanto.

Gia unua celo estas eduki Cseh-instruistojn. Tion ĝi efektivas, aranĝante modelajn kursojn kaj seminariojn. Multaj el vi, karaj legantoj, vizitis eble Arnhemon. Tie, en la Esperanto-Domo, vi ĝuis matene la plezurplenan kurson, kaj poste, vidinte la praktikon, vi aŭdis dum la seminarioj horoj teoriajn klarigojn kaj rimarkojn pri tio, kiel oni devas instrui. Kaj kiam poste la junaj adeptoj mem provis siajn fortojn, prezentante fragmentojn el kurso, vi eble vidis ankaŭ, kiel oni ne devas instrui...

Car la Cseh-metodo, tiel rava kaj facila por la lernantoj, postulas tre grandan lernecon flanke de la instruisto. Oni povus diri, ke multaj estas vokitaj, sed malmultaj estas elektitaj. Ĉiuj, kiu partoprenis kurson de pastro Cseh aŭ de iu el liaj modelaj

disciploj, povas ricevi de la Instituto rajtigon por gvidi Cseh-kursojn. En la nuna momento la Instituto kalkulas 362 rajtigita instruistojn. Bela nombro! Tamen la Instituto avertas, ke la rajtigo tute ne signifas ankoraŭ garantion. La Instituto respondas nur por tiuj instruistoj, kiujn ĝi mem aparte rekomendas. Do se vi, karaj organizantoj, malŝparis la penojn, por starigi Cseh-kurson, kaj la rezulto ne egalas viajn esperojn, antaŭ ol diri, kion oni aŭdas kelkfoje, ke la Cseh-metodo estas «blufo» — trarigardu unue atente viajn korespondadojn: ĉu vi hazarde ne forĝesis antaŭe informiĝi pri la talento de la instruisto?

La Cseh-Instituto estas kvazaŭ teksisto, kiu tenas en la mano diversajn fadenojn; unuflanke estas la laborpretaj instruistoj,

Romain Rolland kaj Pafilo

Ciu konas la nomon de tiu fama riĉulo, posedanta belan, luksan vilaon, bone provizitan konton en la banko...

Ciu konas la nomon de tiu fama verkisto, kiu skribas talente kaj elvokas larmojn en la okuloj de leganto.

Ciu konas la nomon de tiu fama revoluciulo, bolŝevisto, socialisto, pacifisto, kaj defendanto de tiu alia spritulo Gandhi, kiu scias saĝe promeni kun sia ŝafo por havi sian sanktan lakton, sed kiu ankaŭ ne forĝesas havi sufiĉe da mono por pagi kaj surpaci siajn akompanantojn: gazetistojn, raportistojn...

Ciu scias, ke Romain Rolland estas amiko de la konata gandhiano: La Neperforto!

Sed de la teoria predikado al la propra praktikado estas granda abismo...

Laŭ la svisaj ĵurnaloj, lastatempe, maskita ŝtelisto eniris vilaon de la fratino de Romain Rolland: per revesvero li eldeviĝis sin doni al li 20 frankojn. Fraŭlino Rolland, por havi pacon, donis la dudekfrankan bankbileton.

Sed ĝuste en tiu momento ektintis la telefona sonorilo. Estas Romain Rolland, kiu telefonis el sia najbara vilao al sia fratino.

La ŝtelisto malpermesis al fraŭlino Rolland preni la aŭskultilon.

Mirigita pro la silento Romain Rolland kuris al hejmo de sia fratino kaj subite trovis sin kontraŭ la ŝtelisto!

Vi jam vidas, kiel tiu granda pacifisto kaj predikanto de la gandhiana neperforto, ekpraktikas la doktrinon.

Li petas al la ŝtelisto, ke li sidigu. Ekscianta pri lia misero li tuj donas al li ĉekon prezentantan belan sumeton, por ke li senzorge povu vivi dum kelka tempo. Li certe klarigis al li kiom li estas malĝaja, vidante, ke li portas revolveron. Ke frat' fratino ne devas ataki sakale... Li donacis al li kelkajn siajn librojn kaj kun kiso sur la frunto li disigiĝis de sia frato, kiu nun sekvas la neperfortan vojon de la majstro...

Ne eksaltu! Okazis tute alie! La frato Romain Rolland faris ion tute alian. Li eliris revolveron el sia poŝo kaj ekpafis kontraŭ la ŝtelisto!! Felice tremis lia mano kaj la malfeliĉa senlaborulo-ŝtelisto ne estis mortigita!

Jes, Romain Rolland, la granda pacifisto kaj predikanto de la gandhiana neperforto portas — revolveron kaj pafas kontraŭ ŝtelistojn!...

Tiel aspektas ofte eminentaj, sed kostaj personoj, kiujn ni idealigas al ni en nia imago...

S. GRENKAMP.

konstante vojaĝas, laborante alilande), aranĝu en via loko Cseh-kurson, instigu la junajn samideanojn al la praktiko per «La Praktiko». Kaj se vi estos en Hago, ne forgesu iri al Riouwstraat 172, kie en la propra domo laboras la Instituto. Ĝiaj direktantoj, s-ro Andreo Cseh kaj s-ino Julia Isbrucker, jam estas konataj al vi

MIA ANGULO

La spirito ne gravas?

Malofta gasto frapetis sur mia pordo. En la unuaj momentoj li impresis kiel bonvestita senlaborulo kaj mi ne rekonis lin. Lia vizaĝo rememorigis min pri portreto de iu famulo. Gena surpriziĝo tremetis en lia rigardo. Versajne ankaŭ li ne tuj rekonis min.

— Kiu vi serĉas?

Je aŭdo de mia voĉo rekona rideto aperis en liaj okuloj. Certe ĝi aperis ankaŭ ĉe liaj lipoj, sed nekonstateble, ĉar ilin kaŝis lipharoj iom kunigantaj kun lia grizeta barbo. Nur spirilongan momenton tiu rideto radiis al mi tra metalkadrumitaj okulvitroj, poste konataj voĉo kaj parolmaniero revigligis mian memorpovon.

— Ah! tre atestimata samideana moŝto, mi venis ĝuste al vi, kvankam mi estis havanta multule da espero por trovi vin en via alŝatata hejmo, ĉar estas ja ĝenerale sciata, ke vi apostole migras de lando al lando konatigante nian majestatan ideon kaj la lingvon de la homa kompreno inter la idealspiraj gefiloj de la diversaj nacioj, tamen mi riskis frapeti ĉe via pordo por havigi enirpermeson por mi kaj...

La longan bombastan enkondukon plurfoje mi interrompis, sed ŝajne tio ne ĝenis lin. La vortlavango nehaltigeble torentis el li. Fine prenante lian manon amike mi invitis lin en la ĉamburon.

— Nu, jen Mihok!... Mihaelo Mihok, mia malnova amiketo... Kia surprizo!... Jen, fine post tiom da jaroj ni denove renkontas nin!... Kiom da jaroj pasis, mi eĉ ne scias?!

— Guste dekkvar jaroj, tre atestimata verkisto-samideano. Precize en la monato Decembro estos la dekkvarjara datreveno de tiu neforgesbla tago, kiam nia ŝipo «Meinam» atingis la sopiratan havenon en Triesto kaj la vojoj, paralele kondukantaj en la militkaptitecon, subite disigis. (Mihok patose altigis sian voĉon). Sed nur laŭŝajne, tre atestimata iama kamarado kaj nuna verkisto-samideano, ĉar en la realeco ni ambaŭ restis batalantoj sub la sama standardo de la paco kaj homa kompreno kaj...

— Bone, bone, Mihok! Lasu tiujn paco kaj homan komprenon en trankvilo!

— Hah, kiel! Ĉu ankaŭ vi ekordis la tinoj de la pesimismo? Vidu, mi ankaŭ nuras la fajron ricevitajn de vi kaj...

— Kara Mihok, ni parolu iom pli proze! Versajne vi venis al mi ne por stari sur la koridoro, sed efektive honori mian modestan hejmon.

Pro diablo! Jus mi rimarkis, ke la parafrazo de Mihok infektis min. Iom krude mi aldonis:

— Venu internen!

— Guste tio estis mia modesta intenco kaj laŭ via afabla permeso mi volonte profitas la distingindan okazon.

Li paŝis en la ĉamburon. Mi proponis vidalvide seĝon al li. Per tiu proksimeco mi volis nenigi la distancon, kiu li ĉiam klopodis transportigi per artifice poluritaj frazoj. Por krei tujan intimecon mi rememorigis lin pri epizodo el nia militkaptiteco.

— Mihok, ĉu vi memoras kiel fervore mi kraĉadis en vian ciron, ĉar via salivo konsumiĝis kaj la botoj de leŭtenanto Petroff ankoraŭ nekontentege brilis?

— Je mia konsterniĝo mi atingis neatenditan efikon. Lia miemo solene serioziĝis kaj indigno vibris en lia respondo.

— Mi memoras pri tio, ke tiu akvokapa Petroff eĉ ne konjektis, ke pro poeta kraĉo brilis liaj botegoj... Cetere li bone fartas kaj salutas vin.

— Kiu? Ĉu Petroff?

— Nu jes... Vi ja scias, ke li eskapis per nia ŝipo kaj ĉi tie li fariĝis mia unua helpanto en mia metiejo. Ankaŭ mia amata Milla kaj la infanoj esprimas pere de mi koran saluton al vi kaj ankaŭ mia metiej-bubo, en kies kapon fine ni sukcesis enfumeligi la uzon de akuzativo dank' al la ruĝa kredo de la Ĉe-metoda kurso. Do, bonvolu ne rifuzi la respektplenan saluton de nia vilaĝa verda kolonio!

— Ho, neniel, kara Mihok! Mi estas kortuŝita, sed... sed kial vi venis?

— Iom dolore li ekĝemis. Lia miemo aspektis martira. La diablo tiklis min, ĉar tiu martirmiemo incitis miajn ridmuskolojn. Dum longa minuto li sidis senmove, kvazaŭ pozante antaŭ fotoaparato.

— Ĉu vi ne rimarkas la frapantan similecon inter nia karmemora Majstro kaj mi?

Verdire nur nun mi rimarkis, ke li impresas kiel fuŝita Zamenhof-portreto, pentrita de bonvola dilettanto por iu loka kunveno. Nu jen la bildo de fazaŭlo, kies trajtoj skiziĝis antaŭ mi ĉe la malfermo de la pordo. La simileco estis vere frapanta,

precipe ĉe la fasono de la vesto kaj eĉ la insigno. Pro la miro respoguliganta en mia rigardo, en lia sinteno aperis vanta kontenteco.

Volonte mi estus respondinta per vortludo konata: «inter jes, sed interne ne!» Post pripensoj mi simple kaptis. Mi memoris pri liaj strangaj propagandmaneroj. Li prezentas la vivantan pruvon pri tio, ke eĉ la feraj deontoj de la Tempo ne kapablas finmueli la inventemon de niaj entuziasmoj. Dank' al tiu ĉi nedigestebla inventemo nia afero ankoraŭ ne ĉesis esti — kuriozaĵo.

Post kelkminuta ĝuo de sia triumfo Mihok denove melankoliĝis.

— Hah, vane! Ĉiu fortostreĉo de mia homarana koro evidentiĝis vana.

— Mi ne komprenas vin, pri kio vi aludas? Kio okazis?

— Do, aŭskultu min, tre atestimata samideana moŝto!

— Bone, mi aŭskultos, sed, kara Mihok, parolu klare koncize. Evitu la parafrazojn!

— Solene mi promesas, ke mi uzos la simplan homan parolturnaron kaj puran Zamenhofan lingvaĵon neglektante la konektive abundan vortrezoron de la Poezia Fakvortaro, kvankam por reliefigi miajn sentojn kaj por doni la priskribon de okazintaĵoj palpebla en ĉiu nuanco mi bezonus trioblan kvanton da neologaj vortoj ol tiu, kiu enestas en la aŭdacaj revoj de niaj plej progresemaj lingvaj retortistoj. Do koncize...

Kompreneble Mihok restis fidela al si. Pro manko de loko mi resume komunikas nian konversacion. Finfine la senco de la tuta sensencaĵo gravas por la leganto.

— En Januaro nia grupo decidis fari propagandan vesperon kun impona programo — komencis Mihok aplombe — kaj por doni al ĝi veran esperantistan spiriton ni elektis unuaktan teatraĵon, titolitan «Songo de homarano».

— De kiu verkisto?

— Mia modesteco ne permesas nomi la aŭtoron.

— Bone! Daŭrigu, kara kolego!

— En tiu teatraĵo rolas la portreto de nia Majstro.

— Interese! Mi komprenas. Via aŭtoro modesteco kontentigis per la muta rolo de la portreto.

— Eraro! La portreto parolas, eĉ multe. Guste en tiu ĉi kulminas la senkomparebla spriteco de la teatraĵo. La homarano, turmentita de duboj kaj de la hodiaŭa vivmaniero de la homaro, ekdormas kaj en lia sono reviviĝas la portreto de nia Majstro, pendanta sur la muro super lia lito, kaj la milfoje seniluziigitan adepton ĝi rekondukas al la piedestalo de la Espero. Muziko, kanto de nia himno, kolora lumo, kaj la teksto estas kompilita el citaĵoj de la Originala Verkaro. La homarano vekigis kaj venkas ĉiun baron. Jen la enhavo!

— Tute originala temo! Mi povas prezenti la malfacilaĵojn de la portret-rolo.

— Guste vi konjektas. Pli ol du monatojn mi preparis min por la prezentado. Dum du monatojn mi ne vizitis barbon, portis okulvitrojn, observadis la trajtojn de la Majstro sur ĉiu trovebla bildo. Bonŝance miaj haroj ne donis multe da zorgoj. Post du monatoj, kiam sur scenejo mi aperis inter la malplena ora kadro kaj la nigra velurono, la iluzio estis perfekta.

— Mi ne dubas, sed tamen...

— Jes, tamen la rolo bezonis sinoferan fortostreĉon. Prezentu al vi, ke mi devis strari pli ol kvaronhoron en senmova poz. Mia kolo rigidigis, kaj pro la muteco preskaŭ mi raŭkiĝis. Felice mi ĝustatempe retrovis mian voĉon kaj mi triumfe venkis. Mia amata Milla pleregis, la infanoj gapiis, la publiko paligis kaj stertoris pro surpriziĝo en la momento, kiam la portreto reviviĝis. Nur mia metiejbubo embarras la ĝeneralan solenon per sia ekridado. La postan tagon mi mezuris la ulnon al lia dorso. Sed negrave! Do, tiel komenciĝis!

— Gratulinda komenciĝo! Sed kiel ĝi daŭriĝis?

— Vi estus devinta demandi: kie ĝi daŭriĝis?... En Stokholmo.

Subite harstarigajn bildojn skizis mia fantazio. Apenaŭ povante kaŝi mian surprizitecon mi klopodis trankvile interesiĝi.

— Ĉu vi partoprenis en la kongreso? Mi ne renkontis vian nomon sur la listo de la aliĝintoj, nek raporton mi legis pri via rolado.

— Kaŝante la veran personecon mi alvenis. Tio apartenis al mia ideo, savonta la movadon. Pro malfelicia hazardo vi ne legis pri mia rolado. Sed ĉion laŭvice! Mi scias, ke dum kongreso ĉiu oratoro revo-

kas la spiriton de la Majstro aŭ emfaze asertas, ke ĝi estas inter ni, tamen la okazintaĵoj refutas. Mi kurage deklari, ke la spirito de nia karmemora Majstro obstine rifuzis aperi dum la lastaj kongresoj. Nemirinde! Depost kiam oni faris formeblan kaŭĉukon el nia sankta afero por kontentigi la adeptojn de ĉiu difinita koloro kaj akiri la simpatian de ĉiu politika kaprico mi ne miras pri la foresto de lia vera spirito. Mi decidis do surprize ripeti la scenon de la «portreto» dum la solena malfermo. Genia ideo, ĉu ne?

La genia absurdeco de la ideo mutigis min kaj pro ĝentileco la respondo restis en mi.

— Post mia sekreta alveno mi enŝteligis en iun salonon de la kongresejo. Ĉe taŭga loketo mi streĉis per najloj la nigran velurfonon, metis antaŭ ĝi la oran kadron. Mi intencis fari ĉefprovon. Apenaŭ mi estis preta, kiam proksimiĝantaj paŝoj devigis min okupi mian lokon. Kongresaj geamantoj serĉis konvenan anguleton por intima hablado. Ili ne rimarkis min, la «portreto». La interna ideo vualigis ilian vidpovon. Mi pozis senmova kaj la memorbildo pri la unua renkonto al mia amata Milla karesadis mian koron. Iom post iom la intimaj anguloj estis okupataj de paroj kaj de kongresaj konspirantoj. Jen la tempo de la ĉefprovo, mi pensis, kaj mi ekparolis: «Forte ni staru, fratoj amataj!»... Nenia efiko. Pruvo pri tio, ke la Amo estas blinda kaj surda; la konspiro profundigis en sian propran marĉon... Fine mi el la fraŭlinoj rimarkis min kaj timigite ekkris. Iom mi miris pri tio, ĉar kiel eble plej gracie kaj milde mi etendis dise miajn brakojn dirante: «Car hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Stokholmo kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj...» Nu, la efiko estis nepriskribbla.

— Volonte mi kredas tion!

— Jam ĉio ŝajnis esti kontentiga, kiam la temperamenta junulo paŝis al mi kaj impertinente ektiris mian barbon. Versajne li pensis ĝin falsa. Sed kial mi detaliĝu la okazaĵon? La obstina malkompreno eltenis min tra la ora kadro kaj fariĝis skandalo el la asertoj kaj refutoj. Vane mi rifuzis certan suspekton pri malnormaleco kaj vane mi protestis kontraŭ nekompetenta enmiksiĝo de fremdaj personoj en nian sanktan aferon. Multe da anseroj venkas porkon, kiel la proverbo diras kaj mi estis devigata pasigi la kongresajn tagojn en domo, nenomebla de mi. Tiel okazis, ke mi ne povis partopreni en la kongreso kaj vi ne povis legi pri mia rolado. Mia afero klare montris la bankroton de la samideana solidaro kaj la miopecon de la nova generacio, kiu ne kapablas levigi ĝis alto de la simbolismo. Nur post la kongreso mi sukcesis legitimi min kaj samtempe mi sciigis, ke ĝuste en tiu salono okazis la drama kunveno de U.E.A. Ho, se mi estus ĉeestinta!

— Pli bone, ke vi ne ĉeestis.

— Ĉu vi opinias tiel? Eble vi estas prava. Mia vizito en Genevo ŝajnas konfirmi vian opinion.

— Kiel? Ĉu vi faris poste viziton ankaŭ en Genevo?

— Kompreneble!

— Nu jes, post tio estas ja kompreneble.

— La sinjoro, malferminta la pordon, pensis min almozpetanta senlaborulo, ĉar li tuj deklaris sen demando: «Ni ne havas monon». «Ne por peti monon mi venis al U.E.A. — tuj mi rapidis trankviligi lin — sed la intereso de nia afero kondukis min. Mi venis por servi...» Tuj vortoj paligis la tre estimatan samideanon. Versajne per la samaj vortoj li sukcesis iam transpaŝi tiun sojlon. Eble lin timigis la penso, ke mi estas sekreta aspiranto al la direktora titolo. Kiu scias? Fakto estas, ke per sia tuta amplekso li defendis la enirejon. Post longminuta konsiderado okazis inter ni la jena dialogo: «Kion vi alportis?» «Savideon!» «Dankon, ni havas.» «Mi venis por averti vin pri la spirito de nia movado, kies revivigo...» «Silentu! Ne deklamu! Ĉu ne sufiĉe estas ĉiujare unufoje finsuferi la deklamantojn kaj orator-spiritistojn dum la kongreso? Ĉi tie ne estas kongreso. Ĉi tie rezidas U.E.A. Ĉu vi komprenas?»

«Jes, sed la spirito... la spirito estas tre grava... kaj la spirito de nia Majstro...» «Ne deklamu! Se vi havas centmil svisajn frankojn por la afero, vi povos resti kaj de mateno ĝis vespero dancigi tableton aŭ arangi renkontojn al ĉiu fama spirito; se vi ne havas monon, iru en la inferon kaj ne ĝenu nin! Malplena kaso havas mutan spiriton». Senvorte li fermis la pordon antaŭ mia nazo. De tiam la literoj U.E.A. signifas por mi ion alian ol la ĝenerale konata signifo: Universala Enteriga Asocio.

La eksilento kaj tragedia miemo de Mihok permesis konjekti, ke li finis la rakontadon de sia aventuro. Atendplene li rigardis min. Mi ne scipovis diri ion.

— Nu kaj poste? — fine mi komencis.

— Poste nenio. Mi venis al vi por koni vian opinion. Espereble vi estas konsternita.

— Vi eraras, Mihok. Tiu sinjoro absolute estas prava. Senmone eĉ spirito ne

FLUGFOLIOJ

La celo de esperanto estas utili, kiel perilo, inter homoj ne parolantaj la saman lingvon. Tiu rolon ĝi plenumas ok tagojn en ĉiu jaro dum niaj universalsaj kongresoj: estas ja malmulte. Sed, en tiu semajno, ĝi provas, ke ĝi povus utili sammaniere la tutan jaron, se prezentiĝus okazoj. Bedaŭrinde, okazoj tre malofte prezentiĝas...

Mi memoras ke antaŭ tre longe, fama japana eminentulo, d-ro Kroita, el Tokio, venis viziti la urbon Versailles, kie tiutempe mi loĝadis. La tica grupo penis lin akcepti plej bone kaj gastame. Post amika tagmanĝo, ni lin kondukis al la Kastelo kaj al la Parko, kies ĵamo estas tutmonda. De l'mateno ĝis l'vespero ni ne ĉesis interparoli esperante kaj ĝoje travivis veran esperantan tagon. Tamen kvankam mi estas esperantisto de tridek du jaroj, samspecajn okazojn mi povus kalkuli per la kvin fingroj de la mano.

En la daŭro de tiu longa tempo, mi persone varbis minimume kvindek da amikoj, kiuj fariĝis bonegaj esperantistoj. Kelkaj el ili, pro personaj okupoj, ne povis ĉeesti la kunvenojn de sia grupo aŭ loĝis en urboj, kie grupoj ne ekzistis. Ili ankaŭ ne povis veturi al la Kongresoj, ĉar aliaj aferoj ilin tiradis aliflanken. Ili do, ne trovante, eĉ unu fojon, la eblecon uzi praktike la ĵus akiritan lingvon, ĝin forlasis kaj timeble forĝesis...

Jen grava danĝero, kiu parte forigas la agado de la naciaj grupoj, kies utileco ne estas duba. Ili efikas, kiel ligilo malobliganta, ke forflugu la varbitaro, sed, laŭ mia opinio, la grupanoj ne plene komprenas sian rolon. Ĉar la grupo ekzistas kaj kontentige funkciadas, ili kredas la celon trafita. Inter ili troviĝas kelkaj senokupuloj, kiuj estas kontentaj pasigi vintre agrablan kaj varman vesperon; ankaŭ maljunaj fraŭlinoj, kiuj anstataŭigas per esperanto katon aŭ papagon; ankaŭ junuloj, kiujn plezurigas renkonti junulinojn, ktp.: ne zorgante pri la estonteco, ili ĝuas la estantecon kaj ne serĉas pli malproksimen...

Nu, ŝajnas al mi, ke ĉiu grupano, en ĉiu jaro, devus, flanke de la oficialaj kursoj, varbi kaj instrui mem po unu el siaj amikoj aŭ konatoj, tiamaniere, ke la grupo ĉiujare duobligu. Kaj se, en ĉiuj landoj de la terĝlobo, ĉiuj naciaj grupoj ĉiujare duobligu, ĉiujare plioftiĝus okazoj paroli esperanton internacie.

ERA.

povas ekzisti. Vi ekiris por trovi ion netroveblan aŭ troveblan, sed ne tie, kie vi serĉis ĝin.

— Ĉu tio estas do via «homa kompreno»? — li indigne riproĉis.

— Mihok, Mihok, vi estas maljusta. Guste la kompreno donis la vortojn al mi. Kun la mono konsumiĝis ankaŭ la spirito kaj en la nuna atmosfero senpovaj ambicioj baraktas. Oni volas krei el la nenio. Sed la Homo ne estas Dio.

— Bone, bone, sed la ideo mem... nia sankta afero... nia interna ideo...

— Ho, vi naiva Mihok, sen rimedo eĉ spirito restas senpova kaj sen konvena nutro eĉ la plej grandioza ideo forvelkas.

Li nekredeme balancis sian kapon, atendis kelkajn minutojn, poste subite decidante levigis kaj per manpremo adiaŭis.

— Ĝis revido, kara Mihok! Nun kien?

— Al la plej proksima razisto — li respondis rezigne melankolia.

JULIO BAGHY.

La lingvo internacia devas vivi, kreski kaj progresi laŭ la samaj leĝoj, laŭ kiaj estis ellaboritaj ĉiuj vivaj lingvoj.

DRO L. L. ZAMENHOF.

LINGVAJ STUDIOJ

Pri la gramatika terminaro en esperanto

Ciu, kiu pritraktas en esperanto gramatikajn problemojn, baldaŭ staras antaŭ grava decido: ĉu uzi por esprimi gramatikajn nociojn la vortojn destinitajn al aliaj, ĉiutagaj celoj (ekz. *sekso*, *nombro*, *tempo*, *modo*), aŭ transpreni el la internacia terminaro pli specifajn fakesprimojn? Ĉi tie mi celas nur serĉi kelkajn gvidprincipojn uzeblajn en okazoj de neceso (1).

Al profesoro Jespersen ni ŝuldas gravan diskuton — en lia « *Philosophy of Grammar* » (Londono 1924) — pri la utileco fari klaran diferencon inter la ekstera, morfologia (laŭforma) kaj la interna, semantika (laŭsignifa) aspektoj de ĉiu lingva fenomeno. Ofte oni povas rimarki en naciaj lingvoj grandan malakordigon inter la du aspektoj. Jen du simplaj ekzemploj:

1° En la franca, germana kaj aliaj lingvoj, « artikolo », kiu ordinare indikas la virinan sekson (fr. *la, une*; germ. *die, eine*) laŭokaze staras antaŭ substantivo signifanta « viro », ekz. fr. *la, une sentinelle* germ. *die, eine Schildwache* (esperante *la gardostaranto*);

2° Verba formo, kiu ordinare indikas la estantan tempon, la « nun »-tempon povas laŭokaze indiki sentempecon, ekstertempecon, ĉiamcon aŭ almenaŭ temponeŭtralecon, ekz. *la vero ĉiam venkas* (Kompleta Gramatiko, p. 51) aŭ *akvo bolas ĉe temperaturo de 100 gradoj*, ktp.

Ĉi tiuj du ekzemploj sufiĉe montras, ke ni nepre bezonas por la gramatiko du apartajn seriojn da terminoj, el kiuj la unua serio celas esprimi la signifon logikan kaj la dua la formon gramatikan. Kelkaj naciaj lingvoj jam faras tiajn distingojn, tamen ne tute konsekvence aŭ elĉerpe. La franca distingas la biologian *sexe* kaj la gramatikan *genre*, la angla tute analogie *sex* kaj *gender*, ankaŭ la germana *Geschlecht* (*sezus*) kaj *Genus*. Aliflanke la franca uzas *temps* ne nur por la tempo sed ankaŭ por la gramatika formo, kiu indikas tempon, dum la germana distingas *Zeit* kaj *Zeitform* (*Tempus*) kaj la angla *time* kaj *tense* respektive.

Se oni konsentas, ke ankaŭ en esperanto utilis havi specifajn terminojn por la gramatikaj formoj kontraste al la logikaj signifoj, oni demandas al si kiaj terminoj plej faŭgos. Proponindaj kriterioj por influu nian juĝon estas:

1° ke la terminoj laŭeble konformigu al analogiaj formoj jam ekzistantaj en la esperanta radikaro;

2° ke ili ne konfuzigu kun aliaj radikoj jam ekzistantaj;

3° ke ili estu laŭeble jam sufiĉe disvastigitaj internacie.

Aplikante tiujn principojn por trovi gramatikajn terminojn respondantajn al « sekso » kaj « tempo », mi volus proponi al la konsidero de esperantistoj la radikojn *genuso* kaj *tempuso*. Ili obeas al la 1-a kriterio supre, ĉar ili havas paralelojn en *potuso* kaj *ĉirkuso*; ili ne tro similas al aliaj radikoj kaj la latinaj nominativaj formoj *genus* kaj *tempus* estas fakte uzataj de germanaj gramatikistoj kaj jam konataj de ĉiu fakulo. Eventuale ni povus aldoni al la serio da terminoj ankaŭ la radikojn *modus* (angle *mood*, germane *modus*) kaj *ĉe numero* por distingi la matematikan nombron de la gramatikaj formoj indikantaj ununombrecon (*singularo*), du-nombrecon (*dualo*), plurnombrecon (*pluralo*). Efektive estas tre pratike posedi en la gramatika terminaro seriojn kun similaj finsilaboj, do kiel *nominativo*, *akuzativo*, *ablativo*, ktp., tiel ankaŭ *numeruso*, *genuso*, *tempuso*, *modus*.

W. E. COLLINSON.

(1) Ni esperas, ke post la interesa artikolo de profesoro W. E. Collinson, la Esperantista Akademio esprimos sian opinion.

Ni nur atentigas, ke por la formo *genuso*, kiu proponas prof. Collinson, enradikiĝis jam la formo *genro*. — RED.

KNEDUJAJ SKRAPAĴOJ

de FRÉDÉRIC MISTRAL

Filo de et-bienposedanto, Frederiko Mistral (1830-1914) dediĉis sian tutan vivon al la restarigo de la provenca idiomo kiel literaturlingvo. Per mondkonataj vilaĝaj poemoj: *Mirejo* (*Mireille*), *Kalendal* (*Calendal*) Rodano (*Le Rhône*), k.a. li atestis sian sukceson kaj sian genion. Krom siaj grandaj verkoj — inter kiuj ni ne forgesu plenan provencan vortaron — Mistral aperigis en regionaj gazetoj, revuoj kaj almanakoj multe da rakontoj pri popularaj legendoj, moroj kaj kutimoj. El tiu folkloro parto de lia verkaro nia bona kunlaboranto Marc Pujo eliris jenan paĝon, kies ion ni nuanca, sed nekatesteblan ĉarmon niaj legantoj certe ŝatos.

Havis iam junulo tri amikinojn samgajn, samriĉajn, sambelajn. Tiklas agrable, ĉu ne? esti tiam kaj tiam alparolata de ridetema knabino jene:

— Nu, Joĉjo, kiam geedziĝos ni?

Sed la farigon iom konsideru. Kiel mangema azeno inter du deklivoj kreskita de sukriĉa printempe alloga verdajo ŝanceliĝas, kiun pli bongustan elekti, tiel nia trobonŝanca junuleto staris senkonsile... Tamen, sendecide oni ne povas vivi, kaj, asertas proverbo: « Kiu volas ĝui, tiu devas elekti. »

Vintran tagon apudkamene, kun la arimo zorgoplena kaj la piedoj sur ferŝtupo, li klarigis la cirkonstancojn al sia patrino okupita pri faden-bobonado.

— Kompatinda ŝafideto! ŝi diris ridante, ĉu ĉagrenas vin tia bagatelajo? Aŭskultu, filo, mi tuj montrus al vi la irantan vojnon. Ni virinoj konas la sekretan lokon, kie la diablo tenas sian ferrubajon.

Do belecon, junecon, monon, ankaŭ saĝon kompreneble posedas viaj tri amikinoj. Sed beleco utilas, nek por manĝi, nek por trinki; sen ordemo rapide elĉerpiĝas riĉaĵoj, kaj juneco similas kandelon, kiu forbruligas brulante.

Al homoj kiel ni estas nepre necesa virino hejmana, ne bezonanta aliajn por bakaado, supkuirado, tuklavado; kiu zorgu pri la domaj aferoj, ne la fenestroj; kiu estu goĵo por la hejmo, ne por la strato; virino ŝparema ne elspezema, ĉar monon oni povas facile gajni, sed malfacile konservi...

— He, he! interrompis la knabo, jam ĉi tie komplikigas la afero. Por ekkoniti, oni devus posedi la lertecon de astrologo! Erarige estas, juĝi laŭŝajne pri persono, kaj mi aŭdis, ke knabinoj ŝajnas kaŝtanoj: alloga ekstero, putra interno.

— Ne, kara, nenio estas malpli erariga; nur malsaĝaĵoj fiaskas. Jen kion vi faru: vian maldekstran manon vindu per tuko; laŭvice vizitu ĉiun knabinojn, kaj diru: — « Bonan vesperon! mia fingro doloras. Vi, belulino, povas ĝin resanigi ĉar, por ke pli frue krevu la absceso, necesas laŭdire, ke oni ĝin ŝmiru per iom da kneduja skrapajo. » Iru gaĵe, kaj baldaŭ revenu, raportu pri la respondoj.

Eliras Joĉjo unue al Johana. Tra defluiltruo kune elŝprucis eksteren lampo lumradio, akraj virinaj vortoj kaj klara voĉo de junulino. Evidente la knabo:

— Bonan vesperon, amikinoj!

— He! kia bona vento vin alŝovas?

— Mia fingro doloras... Vi Johana povas min resanigi ĉar laŭdire, por ke pli frue krevu la absceso, necesas, ke oni ĝin ŝmiru per iom da kneduja skrapajo.

— Ho! kara malsanuleto, por vin resanigi, se nur tio sufiĉas, estas ja tre facile; mi domagos al vi dankan memoraĵon al la sanktuloj Baŭdilo aŭ Lazaro.

Kaj Johana rapide kiel birdo levus la kovrilon de la knedujo, sur la tabuloj kaj laŭlonge de fendetoj sepe ne deskrapas per sia tondilo restaĵojn de panpasta, kaj donacas al Joĉjo.

— Nu, dankon Johana!

— Bonan nokton!

Ambaŭ kareseme okulumas unu al la alia, la pardon Joĉjo senbrue fermas, kaj tuj kuras al la domo de Agata.

Ce Agata kune kun dikaj knaboj oni amuziĝis, por pasigi la tempon, kiel oni kutime faras vintre, kiam neniu estas laca. Unu el la knabaro klinis la kapon super la genuoj de kunulino, kiu per siaj beletaj fingroj ŝtopis al li la okulojn, kaj meze de ridkrioj pugne batis kaj batis lian dorson kantaŭte:

Figoj ĉi nokte farigas kaŝtanoj: Tondulo, kornulo, obstinegulo. Kiom da kornoj havas vi surkape?

Kaj la knabo divenu, kiom da fingroj estas streĉitaj, aŭ denove klinigu kun ŝtopitaj okuloj.

Subite aperas la ruza malsanulo.

— Bonan vesperon! li diras.

— Jen Joĉjo! kaj oni tuj invitas lin ludi.

— Neble, li klarigas, la fingro min doloras... Vi Agata bela povas resanigi la absceson ĉar, por ke ĝi pli frue krevu, necesas, ke oni ĝin ŝmiru per iom da kneduja skrapajo.

— Vere! Agata respondis ekkurante al sia knedujo, vi ĝuste trafis, ĝin mi neniam skrapas.

Kaj la naivulino deŝiras por li pastpecon tiel larĝan kiel fromaĝo.

— Kaj se vi ankoraŭ bezonos, kara bubeto, vi scias kien veni!

Foriras Joĉjo kaj rapidas al Lucia. Ce tiu ĉi amikino, sub la lampo brilgaĵe pendanta de la plafono, oni povis vidi la bildon de feliĉa hejmo. Ĉiu ano de la ronde sidanta familio havis intergenue tukon plenan de olivoj, kiujn li pikis per pinglo unu post alia, kaj jetis en la akvon de argila ujo, por forigi el ili la amarecon.

— Nu, Joĉjo, jen vi malfruis en la nokto senluma! Sidigu vin do kaj helpu nin.

— Ho ne! mia fingro doloras; vi Lucia bela povas ĝin resanigi ĉar, por ke pli frue krevu la absceso, necesas, ke oni ĝin ŝmiru per iom da skrapajo el via knedujo.

— El mia knedujo? ĉis Lucia. Same kiel ekzistas nur unu Dio, vidu mem, mi ne povas havigi al vi ĉereton dikan kiel formika piedeto! Mia knedujo tie staras pura kaj glata kiel spegulo...

Sed Joĉjo jam estas for. Kun poŝo plenplena de diritaĵoj li alvenas hejmen, kaj pri la knabinoj ĉion raportas al la patrino.

— Nu bone! konkludas la afabla helpemulino, Johana, kiu antempe malsatas pastpecojn en sia knedujo, havos estonte kotmakulojn sur sia jupo. La bela Agata estas iom ventanima; la pasto kaj faruno, kiujn ŝi nun malsparas, iam mankos en sia malbona pano.

Tiuj senordemaj knabinoj flank-mis, mi konsilas, kaj elektu Lucian.

Lucia, ho mia filo! Lucia, kiu tenas sian knedujon glata kaj brila kiel spegulo, ankaŭ kiel spegulo lumigos al vi la vivon per sia konduto...

MARC PUJO.

LINGVA KONSILANTO

« En Plena Vortaro kaj en Kompleta Gramatiko de Fruictier mi legas, ke el la prepozicio « laŭ » estas deriveblaj « laŭa », « laŭeco » k.a. Sed nek en Plena Vortaro, nek en Kompleta Gramatiko oni trovas ekzemplojn pri la uzo de « laŭa ». Aliflanke, en miaj ĝismunaj legaĵoj mi ne renkontis (aŭ plu ne memoras ĉu mi renkontis) la adjektivon « laŭa ». Ĉu *Nia Gazeto* bonvolos liveri al siaj legantoj klarigojn kaj precipe ekzemplojn (el verkoj de Z kaj de bonaj aŭtoroj) pri la ĝusta uzo de « laŭa »?

Teorie kaj principe ĉiu lingva elemento en esperanto povas esti kombinita kun ĉiu alia. Tiaj vortoj, kiel *laŭa* kaj *laŭeco* estas do tute regule faritaj kaj libere uzeblaj. La demando nur estas, ĉu ili estas sufiĉe klaraj, kaj... *laŭaj* al niaj lingvaj kutimoj. Tre volonte uzos ilin matematikemaj « logikuloj », kiuj jam uzas *onin* kaj *onin*, aŭ amantoj de lingvaj strangaĵoj, kiuj nepre volas havi « originalan stilon ». Ordinaraĵ « simplaj » homoj sendube preferos *konforma* kaj *konformeco*, internacie pli klarajn kaj pli kompreneblajn.

Neniam mi rimarkis en Zamenhofaj verkoj la uzon de *laŭa* aŭ *laŭeco*. Zamenhof estis simpla homo... — P. C.

Bona esperantisto devas koni ne nur la formojn de la lingvo sed ankaŭ ĝian literaturon, ĝian spiriton, ĝian artan flankon.

HECTOR HODLER.

Karavane al Sat-Kongreso

(Oni scias, ke en aŭgusto okazis en Valencio (Hispanujo) plensukcesa Kongreso de SAT. Multnombro nederlandanoj iris tien karavane. Bedaŭrinde manko de spaco ne ebligis al ni enmeti la tutan vojaĝpriskribon de F. ten Hagen. Sed kun vera plezuro ni publikigas parton el tiu artikolo, nome viziton al Verdun'o, fortikajo fama el la mondmilito. — Red.)

Trumpetonoj vekis nin jam frue. Montrigis, ke nia tendarloko kuŝas tuj apud fortikajo kaj kredeble eĉ apartenas al ĝi kiel maskaĵo. Tamen da soldatoj pasis portanta unu fusilon en la mano kaj duan sursultre. Strange, ĉu la fusiloj estas tiel maltaŭgaj, ke la soldatoj bezonas du por esti pretaj en okazo de neceso?

Kulturisto, kies bieno limis al nia tendaro, prezentis al nia gvidanto bukedon da floroj, kiuj montris la kolorojn de la franca standardo: bluo, blanko kaj ruĝo. Estis gentilajo, kiu ni certe de tia simpla viro ne atendis.

Poste ni havis agrablan surprizon. Germana esperantisto, kiu jam depost la milito loĝas en Verdun'o, eksciis pri nia ĉesto, mateno venis al ni kaj proponis konduki nin al la vidindaĵoj de la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Volontito ni akceptis. En la lingvoj germana kaj esperanta, li informis, ke en Verdun'o la civitanoj nombras ĉirkaŭ dek ses mil, ke la garnizono konstante konsistas el almenaŭ tridek mil soldatoj. Ni atingis la straton, kie hieraŭ la muziko sonis. La restoracioj estis ankoraŭ fermitaj, sed je la kontraŭa flanko ni rimarkis tre grandan militmonumenton, kiu konsistas el alta larĝa ŝtuparo kondukanta al plataĵo sur kiu troviĝas turo flankita de du kanoj. Kies tuboj estis turnitaj al Oriento. Tre interesa ni ne trovis la konstruaĵon kaj restis nur mallonge. Baldaŭ la urbo restis malantaŭ ni. Ambaŭ flankoj de la vojo estis baritaj per pikdrato kaj post la drato troviĝis tabuloj kun la suskribo « Danĝera tereno ». La klariĝo estis, ke tie kuŝas la kampoj kie dum la jaroj 1916-1917 la armeoj plej furioze batalis. La falintojn oni kolektis kaj enterigis en proksima amastombo, sed la neeksploditaj bombaj, kiuj ankoraŭ estas trovajblaj tie ĉi, kaŭzis ke oni starigis tiujn avertotabulojn.

La germana kamarado informis nin pri la nombro da soldatoj, kiuj tie batalis, kion el ili restis sur la kampo de la honoro. Liaj vortoj nin ne tre tuŝis. Aŭstataŭ diri centmilojn li povus diri milojn da falintoj kaj ni same bone kredus al li. Ni ja ne vidis la martirtojn, ni nur vidis en la tero la truojn kaj kelkloke iom da pikdrato. Sed aligis nia animstato, kiam ni proksimiĝis al amastombo de Duomonto. Nia kalkulkapablo en momento nombris la lignajn krucojn. Certe estis kelkaj miloj, eble dek mil aŭ eĉ pli. Imagu, ke tie restarigas la junulojn, kies kadavroj nun troviĝas sub la tero. Tiel ni formis pli ĝustan opinion pri la nombro da viktimoj de la milito...

Post tiuj kampoj de lignaj krucoj staras grandega konstruaĵo en formo de kuŝanta kruco sur kies centro levigas alta turo, kiu vespere eljetas fortajn lumradiojn kvazaŭ por gardi la apudan teron. Ni eniris, unue renkontis statuan de virino en funebraj vestoj, kiu signifoplena tenas unu fingron sur la lipoj. Al dekstra kaj maldekstra flankoj troviĝas, tute similaj koridoroj en kiuj oni konfuitis vicojn da niĉoj, kiuj domas lokon al po da ŝtonaj tomboj. La muroj konsistas el kahiloj, kaj ĉiu kahilo surbavas la nomon de soldato kaj numeron de la taĉmento en kiu li servis. Je la fino de ambaŭ koridoroj estas granda cirkloforma tablo, kie la unuan de aŭgusto, dato de la militokomenco, ekbruligas granda flamo flagranta, por ke la homoj neniam forgesu tiun fatalan daton.

— Ni jam ne aŭskultis la voĉon de nia klariganto, kaj memstare rigardis la tombojn de kies piedoj troviĝas kelkaj velkintaj floroj. Pruvo, ke oni ne forgesis ilin...

La tria parto de la konstruaĵo konsistas el preĝejo en kiu neregule okazas diservoj. La tuto tiel impresis al ni, ke pluraj personoj frotis sian nazon kaj kase visis la larmojn.

Dum la reveturo al Verdun'o estis al ni kvazaŭ tiu granda krucekonstruo tute pezis sur niaj animoj, tiel almenaŭ aspektis la memoroj...

Post akto de la ĉiutage necesaj manĝaĵoj, kiuj eĉe konsistis el pano kaj butero, ni forlasis Verdun'on kaj ek al Dijono!

La Meŭzo restis post ni kaj la vojo kondiĝis nin tra kamparoj zorge prilaboritaj. La greno ondis sub la dolca premo de varmeta vento kaj la salutoj de la kamparanoj malpezigis niajn korojn. Vespere, je la sesa, ni atingis sen iu ajn akcidento Dijonon. Esperantisto el ĉi tiu urbo jam atendis nin kaj gvidis la karavanan al tendarloko proksime al la urbo. Post starigo de la tendoj ni aŭtobuse revenuris al Dijono kie ni tagmanĝis la unuan fojon en la franca kuirarto. Ne eblis al ni plene honoro la kuiriston. Kelkaj el liaj produktoj tro kontrastis al nia gusto, pro kio ni kun duonplena stomakoj ĉesis manĝi.

F. TEN HAGEN.

Post Stokholma Kongreso, post la fortaj manpremoj, post la varmaj ĉirkaŭbrakoj, post la pli maloftaj kisoj mi volis spiri freŝan aeron, en kiu ne troviĝos la esperantaj baciloj.

Kaj mi veturis al Jamtlando, al norda parto de Svedujo, al la belaj lagoj kaj ĉarma regiono, kie oni povas ripozi trankvile, bonege kaj — malkare.

Ju pli Norden vi iras la naturo forlasas sian ridetantan aspekton kaj survestas aspekton pli grandiozan, pli impresan kaj pli imponan!

Laŭlonge de la balta marbordo defilas antaŭ viaj okuloj seĝejoj kaj paperpastaj fabrikoj. Ofte haltigas vian rigardon belaj, malgrandaj urbetoj.

Jen *Ostersund*, kie ĝuste okazas ĝenerala kunveno de la svedaj ĵurnalistoj.

Ostersund, malgranda urbo, survoje de la sveda marbordo al la norvega limo. Proksime de famaj montoj kaj de ripozokoj Are, Halland, Sterlien, survoje al Kolasen.

Ostersund, kuŝanta apud belega lago *Storsjön*, havas tre interesan ĉirkaŭaĵon. Kontraŭ la urbo troviĝas malgranda, rava insulo *Frosön*, plena de arbaretoj kaj plena de floroj.

Unika vidaĵo estas la panoramo de sur *Ostberget*. Jen monto *Areskutan*, kien mi grimpos post kelkaj tagoj.

Tiu malgranda, plaĉa urbo de 15.000 loĝantoj havas muzeon. Jes, estas agrabla konstato, ke eĉ tia urbo povas havi tiom belajn, zorge prilaboratajn kolektojn el la sveda prahistorio.

Duetaĝa, granda, ruĝa konstruo enhavas multajn valorajn trezorojn.

Oni povas admiri, ke tia nerica provinco povas entute posedi Muzeon. Feliĉa lando, arŝtataŭ elspezadi por militoj, ĝi scipovas pli saĝe kaj pli inteligente eluzi sian moron.

La kvardek ĉambroj de la Jamtlanda Muzeo estas plenaj. Troviĝas tie ankaŭ multaj valoraj pentraĵoj kaj skulptaĵoj.

La prahistoria parto kaj tiu de la vilaĝo vivo estas admirinde ordigitaj. Mi estis mirigita kiom da komuneco en la objektoj, en ilia formo kaj koloroj oni trovas inter la pola kaj sveda vilaĝarto kaj objektoj!

La konservisto Bjorkquist kondukis nin atente kaj donis al ni afable ĉiajn klarigojn.

Se ni povis en unu duontago trakuri la urbon, viziti la muzeon, vidi la tutan ĉirkaŭaĵon tion ni dankas unuavice al la simpatia direktoro de la Turista oficejo, s-ro R. Olsson, kiu afable aranĝis ĉion kaj zorgis pri ĉio.

Li eĉ ne forĝesis anonci min, alvenon al la svedaj ĵurnalistoj kaj invitigi min al komuna manĝado!

Jes, la sveda lando estas vere la plej agrabla turista trezorujo. Tie vi pasigas ne nur tre malkare vian libertempon, sed oni ankaŭ zorgas pri plenumo de ĉiu via deziro.

La turistaj oficejoj havas inteligentajn, kapablajn kaj tre simpatiajn gvidantojn. Tion ni rimarkis jam en Stokholmo, kiam ni havis la plezuron paroli kun la direktoro de la Sveda Turista Oficejo, s-ro kapitano Peyroun.

Cetero estas ti, kiu instigis min veturi al *Are* kaj *Kolasen*. Kaj mi ne bedaŭras. Tiu vojaĝo, krom ripozo, permesis al mi enprofundiĝi la svedan kulturon, la svedan intiman vivon. Ĝi permesis al mi admiri ne nur belan, harmonian kaj ripozigan pejzaĝon, sed ankaŭ la simplecon kaj bonecon de la sveda popolo.

Pli proksimiĝi ĝin kaj pli ami ĝin, kvazaŭ ĝi estus popolo al kiu mi ankaŭ apartonus.

Jen *Are*, bela panoramo vidiĝas antaŭ viaj okuloj. Apud longforma lago *Aresjön* kuŝas tiu ripozejo kien venas multnombraj turistoj vintre, sed kien ankaŭ sonerepelus vin ripozdeziro. Bona, montara aero, sed ne tro akra, pro tio bonega loko por kvietigi siajn nervojn, eĉ post Universala Kongreso.

Estas plena naturo de l'belo kaj dank'al tiu ĉarma, ridetanta regiono mi sukcesis fine fari la raporton pri la 26-a kaj kontentigi la — linotipistojn de nia granda presejo.

Cu mi reparolu pri *Are*, *Areskutan* kaj ĝia regiono? Mi jam enplektis en mian kongresan raporton miajn impresojn. Eble mi aldonu, ke en tiu ripozejo ekzistas granda hetela konzerno, kiu zorgas, por ke la gastoj sentu sin plej bone. Malkare, vere malkare ili donas al vi ĉion laŭ plej bona kvalito, ili zorgas pri la ekskursoj kaj aliaj plezuroj por siaj gastoj. La ĉiam afabla, benhumora kiel sudano, direktoro Marcus, meritas apartan ĉapitron...

Mi preskaŭ forgesus pri malgranda okazintaĵo! Otto von Habsburg, la juna tronkandidato ankaŭ traveturis *Are* dum mia tiamana ĉeesto (mi substrekas, ke li tion ne faris pro mi...) kaj mi havis la plezuron paroli kun li. Kiel tion ne diri publike? La komunistaŭ invitas reĝojn al si, faras al ili belajn donacojn, dum ilia popolo krevas pro malsato vicorde, — la socialistoj (ankaŭ komunistoj) akceptas ĉiaspecajn orde-

En Jamtlando

S. Grenkamp

nojn, promenaĉas en luksaj Lincoln-oj, havas brilantojn kaj plenŝtopitajn monujojn, scias elprofiti ĉian okazon por riĉiĝi, — kial mi ne kuraĝu, paroli kun simpatia junulo?

Otto von Habsburg estas simpatia kaj modesta junulo. Almenaŭ tiel li aspektas kaj tia li ŝajnas esti.

Otto von Habsburg forveturis per aŭtomobilo. Li okupis la lokon apud la ŝoforo-



EN JAMTLANDO : AKVOFALO TAMFORSEN



PEJZAGO EN JAMTLANDO

kaj liaj du akompanantoj okupis la sinjorajn lokojn. Nu, eĉ tiu gesto plaĉis al mi, se ĝi eble ne plaĉas al vi!

Unuvorte Otto von Habsburg scias gajnadi al si simpatiojn, se ne en sia lando, certe en multaj aliaj...

EN KOLASEN

Mi veturis al *Kolasen*.

De Jarpen ĝis *Kolasen* vi preterveturas laĝon *Kallsjön*. Preskaŭ dum 85 kilometroj vi havas ĉiam, seninterrompe ravan panoramon. Longa la lago estas de 40 km., larĝa de 14 km. kaj profunda kiel la okuloj de via amantino de 381 m. Nepriskribebla bela vojaĝo. La koloroj, la montoj ion nekŝovritaj, la ĉiama ŝanĝo de l'pejzaĝo, la subiranta suno reflektanta siajn ĉarvojn kaj radiojn en la akvoj kreas farbojn indajn de plej granda pentristo!

L'lokoj ankoraŭ ne multe admirataj de la svedoj mem, vi meritas konstantan alfluan de turistoj! Malnute da lokoj ĉarmis min kaj kaptis pli ol dum tiu vojaĝo.

Kaj *Kolasen* mem!

Inagu vilaĝon inter montoj kaj lagoj.

Sajne kvazaŭ *Sinajo* de kiu vi povas ĵeti admirajn rigardojn ĉirkaŭen! Ŝajnas, ke sufiĉas fari unu paŝon por trans la lago troviĝi sur la pintoj de *Anjeskutan*, *Manshogarna*!! Impresa regiono!

Jes, kapitano Peyroun, vi pravus miloble vi pravus, tio estas perlo de Jamtlando. Kaj mi komprenas viajn klopodojn por tien al'iri viajn samlandanojn!

Are, *Kolasen*! Mi ne forgesos vin kaj iun tagon mi plezure revenos en vian regionon por ripozi kaj vin admiri! kiuj scias nenian fremdan lingvon... Inter ili estis Karlo Melin. Kaj kiam unu tagon

REE EN OSTERSUND

Sed venas tago de reveno...

Ni revenas, ni reveturas rapide, timante, ke tro malrapida reveturo, dumvojaĝo haltaj, kreos en ni tro fortan nostalgion...


Jen la vagonaro kantas, frapas en la cerbon: Revenos vi, revenos vi, unu fojon pli malrapide, unu fojon pli rapide ĝi martelas tiujn vortojn.

Kaj mi promesas reveni...

Mi rigardas tra la fenestro de mia vagonkako. La vesperaj horoj en la tiom riĉaj, abundaj preskaŭ neimageblaj koloroj altiras min. La sunaj radioj elvokas paradizan belecon sur tiu lago. Rebrilas ili jen kreante perlan surfacon de la lago *Storsjön*, jen donante al ĝi ruĝan, bluan, profunde nigran aspekton!

Ostersund! Ree en *Ostersund*, sed ĉifoje atendas min jam amiko, sindona kaj simpatia kolego, sveda poeto Karlo Melin, redaktoro de *Jamtlando Fidving* kun kiu mi habiletas en esperanto! Ŝajnas al vi strange, ke mi tion notas, sed se vi pacienkos, vi komprenos, kial mi pri tute intima renkonto al vi parolas!

Jen aŭskultu! Post *Ostersunda* Kongreso la svedaj ĵurnalistoj venis grandare al *Are*, tie ni pasigis du tagojn kune. Komprenble mi habilitis en ĉiuj eblaj linvoj por povi kompreniĝi kun ili. Sed malfeliĉe ne kun ĉiuj mi interparolis, estis kelkaj,



INTERNO DE LA 400-JARA LIGNA PREGĜEJO EN ARE

ni restis kune, la aliaj ekskursis en regionon, kiun ni jam vizitis, ni estis devigitaj provi interkompreniĝi...

Kaj jen Karlo Melin eksetis, ke mi konas esperanton, pri kiu li iam aŭdis, eĉ ŝajne lernis.

Sekvis unuhora, eĉ ne! kurso laŭ la plej nova, plej brila kaj plej fama (komprenble!) Grenkamp-metodo kaj, mi juras al vi, ni povis poste interkompreniĝi!

Komprenble, mi estu justa, ni ne povis ankoraŭ diskuti pri la gravaj problemoj

de nia movado, ni ne kapablis ankoraŭ serĉi la truan, en kiu enfalis tiom da esperoj, — ni ne povis babiladi pri la fama esperanta Locarno-epoko, — ne, tio estas vere, sed dank'al tiu fama metodo ni sukcesis interkompreniĝi, ni sukcesis ĝoji, ke ni komprenas unu la alian!

— Kaj nun sur revena vojo mi ĝojis renkonti mian amikon, kiu jam intertempe fariis admirindajn progresojn kaj babilis kaj bondeziris al mi preskaŭ en akademia (1) lingvo!

Ni ĝisrevidas. Ankoraŭ la *ostersunda* lago rebrilas antaŭ miaj okuloj perlamente, kaj la vagonaro forportas min al Stokholmo.

EN STOKHOLMO LA POSTKONGRESA

Jen en Stokholmo. Mi forlasas rapide la hotelon kaj somnambule kuras al la parlamentejo. Nenia postsigno de esperanta vivo... Ne plu ĉirpas en ĉirkaŭo junaj kaj maljunaj paroj... Silento... Preskaŭ tomba silento... La flagoj estas for... La esperantistoj ne plu plenigas la grandan antaŭplacon...

La oficialaj delegitoj ne plu amike insultas unu la alian...

La Sekcio de Kontrolo povas fari neniajn originalajn rimarkojn... Ne plu floras neologismoj sur la parlamenta placo...

S-ro Szilagyi ne plu povos diri, ke li havas gravan rendevuon (poresperantan!) en la ĝardeno de la parlamentejo...

Mortis, tute mortis la 26-a!

Restis nur rememoroj, neforgeseblaj rememoroj, kiuj pelos vin ĉiam — kiam vi elvageniĝos en Stokholmo — al tiu fama placo, al la parlamentejo, al nia parlamentejo...

Mi havis ankoraŭ plezuron iri al du kunvenoj.

Mi ĉeestis la kunvenon de Esperantista Grupo kaj mi estis mirigita pro la freŝeco de la kunveno. Multnombro kunveni ĝuste post la ĉkazinta Kongreso, ankoraŭ havi tian fervoron kaj entuziasmon, tio estas publike laŭdinda!

Jen ges-roj Malmgren, jen ankoraŭ la ĉiam ridetanta kaj ĉiam gaja s-ino Gernsbacher, jen la juna, ĉiutage enamigema, delegito de U.E.A. nia sprita amiko R. Pehrsson, jen aro da simpatiaj fraŭlinoj, la gojo de la grupo, jen la prezidanto Nils Hedgren, jen, jen, jen multaj aliaj...

Mi admiris la bonedukitecon aŭ pli ĝuste la paciencon de la membroj aŭskulti la troreklamitan germanon, kiu parolis en tiom sovaĝa esperanto, ke doloris al ĉiuj la oreoj. Ŝajnis, ke li perfortas arĝigi nian lingvon laŭ sia modo...

Pacience oni eltenis. Poste rapide la junaj kaj koraj manoj de la bluokulina sekso preparis la tablojn, teon, kafon, kukojn.

Kaj, ho teruro, la prezidanto ne timigas ankoraŭ aŭdigi la voĉojn, la postrestintajn eksterlandajn voĉojn!

Tu angla instruistino (mi perdis miajn notojn!) kuraĝas eĉ legi longan studon pri la lernejaĵ eksperimentoj, restas en mia memoro: ŝia profesora mieno, la longa, por ŝi ne teda, manuskripto, postĉaha! — ŝiaj okulvitroj, cito de d-ro Privat, pruvo, ke la eksperimento sukcesis, — buldogoj kaj esperantistoj! Cu vi ne kredas? Jes, laŭ ŝia opinio, la esperantistoj devas esti buldogoj. Tio longe, kiom ĉiuj ne estos buldogoj esperanto ne sukcesos!...

Cu mi diru, ke ankaŭ s-ino Gernsbacher parolis, ke mi ankaŭ diris kelkajn vortojn por kontinui la enuon de la kunveno?

Krom la paroladoj la kunveno estis agrabla, viva, amuza!

La morgaŭan vesperon mi ĉeestis la kunvenon de la *Laborista Esperantista Klubo*. Mi vere ĝojis troviĝi en tiu agrabla kaj entuziasma societo. La laborista movado en Svedujo estas forta, plena de bonavolo, bone organizita, kun modela oficejo, ĝi meritas niajn sincerajn gratulojn.

La animo de la laborista movado estas socialista deputito *Ernst Eriksson*. Homo tre simpatia, bona organizanto, patra zorganto por la laborista movado.

Estis vera plezuro por mi retrovi tiun helpeman amikon, kiu dediĉas sin kun tuta sia entuziasmo al esperanto.

Mi revidas multajn vizitaĵojn, kies nomojn mi bedaŭrinde ne senerare retrovas en mia memoro (mi perdis la notojn!)

Mi revidas *Jotjon*, jes tian karesan nomon havas *John Johansson*, redaktoro de *Svenska Arbetar Esperantisten*, oficiala organo de Sveda Laborista Esperantista Federacio.

Oni eĉ faris al mi grandan honoron, ke mi parolu. Mi klopodis plenumi la taskon laŭ mia povo, sed kun plezuro. Ni babilis, ni trinkis kafon kaj ni kantis.

(Daŭrigo p. 6)

(1) Komprenble ne estas aludo al la Esperantista Akademio!

LANDO de Rembrandt kaj Spinoza, lando de tulipoj kaj hiacintoj, lando de benodorci floroj kaj de bonaj paŝtejoj, lando de kanaloj kaj de mucliloj, lando de energia, laborema kaj realista popolo, lando de belaj naciaj kostumoj, lando de gaja bonhumoro.

Lando de « verbo » kaj de « animo », lando de « sano » kaj de « vero », lando de « eterna » kaj de « amato »...

Jen mi en Nederlando, lando de alta valuto, lando de florenoj!

Hengelo! Mi devas elvagoniĝi, ĉar la turista oficejo misinformis min. Se mi volas atingi Arnhemon, la urbon de la Esperanto-Domo, mi devas atendi tie ĉi tri horojn kaj preni alian vagonaron!

Mi elvagoniĝas kaj estas mirigita pro la esperantistigo de la nederlanda tero! Ĉu tio estas influo de la Cseh-kursoj aŭ ĉu mi estas malsana? Jen, vere mi legas: *Animo, Sano, Vera, Eterna, Amato!*... Iam, nia movado estas forta en tiu lando, se tiom da esperantaj nomoj mi trovas sur ĉi-landaj afiŝoj. Ĉu eble en Nederlando ekzistas multaj esperantistaj riĉuloj, kiuj kreis diversspecajn industrion kaj nomis siajn produktojn per esperantaj nomoj? Brave! Mi jam antaŭvidas la projekton de U.E.A., kiu impostigos tiujn sinjorojn!...

Sed mi ne havas tempon tuj prepari projekton kaj sendi al ĉi tiuj talentaj, kapablaj, admirindaj oficialaj delegitoj, ĉar mi ekvidas esperanto-stelon sur brusto, aŭ pli precize sur mantelo de fraŭlino. Kia ŝanco! Anstataŭ sidi en restoracio kaj trinki kelkajn kafeojn mi havis plezuron paroli kun juna esperantistino. Tio estis ankaŭ ŝanco por la fraŭlino, el malgranda nesto, ĉar ŝi unufoje renkontis eksterlandan esperantiston!

Mi daŭrigas la vojaĝon, sed pardonu, se mi ne observas la pejzaĝon! — kontraŭ mi sidas juna hungarino; mi pensis al neologismujo kun mia tuta simpatio kaj tial ekkonversaciis kun ŝi. Ni parolis en ĉiuj eblaj lingvoj, sed fine daŭrigis la konversacion en la franca. Esperanton — ĉu feliĉe? — ŝi ne konis. Almenaŭ unu

En Nederlando

S. Grenkamp

Ci tien, kie iam troviĝis la urbo de Tacito *Arenacum* mi revenadis ofte por — dormi kaj por repreni miajn valizojn!

En la Esperanto-Domo mi trarigardis la albumojn kaj la amuzajn ofte trafajn priscribojn kaj rimarkojn.

Hugo Poppér, ĉeĥoslovako, oferis tutan albumon kun fotoj, belege aranĝitan. Sub ĉiu foto troviĝas duversoj.

nias, ke certe ne estas kulpo de Hago, ke tiom malmulte da justeco estas en la mondo!

Belaj, largaj stratoj kaj avenuoj, trarandaj ofte per kanaloj, belaj, agrablaj promenadoj, kiuj kondukas vin al *Scheveningen*, mondkonata banloko, kie mi promenis dank' al la afabla gvidado de mia malnova amiko Ravesten, bonega fotograf-kaj filmamatoro.



EN LA STRATOJ DE ROTTERDAM TOLBENDOJ ALVOKAS : LERNU ESPERANTON!

al *Slikkerveer*, malgranda industria loko, kie mi devis paroli. Tre interesa grupo, al kiu apartenas la direktoro, superaj oficistoj kaj laboristoj de grava motorfabriko.


La motorfabriko Smit estas bone konata en Nederlando kaj ĝia direktoro s-ro C. Pot estas fervora esperantisto. La fabriko Smit en sia eksterlanda korespondado uzas ofte esperanton. Se ni havus pli multe da tiaj seriozaj praktikistoj inter la esperantistoj, se ĉiuj industriistoj kaj komercistoj sekvis tiun belan ekzemplon, tiam esperanto certe estus havinta pligrandajn kaj frapajn sukcesojn. En tiu industria nesto troviĝas ankaŭ bela domo kun la sunskribo *Klavar-skribo*. La juna direktoro J.J. Pot afable klarigis al mi sian novan klavarskribon, kiu estas tre praktika kaj de nun la muzikado estas multe pli facila, ol laŭ malnova muzika notaro. Iam mi legis en esperantaj gazetoj pri tiu nova invento, sed ne multe mi atentis ĝin. Nun mi konstatis, ke la entrepreno kreskas, ke kursanoj troviĝas en ĉiuj anguloj de l'mondo kaj ke tiu moderna muzikskribo helpas ne nur al pli plezura, al pli fervora muziklernado, sed ankaŭ al disvastigado de nia lingvo.

Ĉiuj oficistoj en tiu entrepreno parolas esperanton, multaj esperantaj muzikistoj jam aperis en la nova klavarskribo.

Sed kio plej impresis min estas la *klavarskribo*. Admirinda inventaĵo! Ligita facile al ĉiu fortepiano, tiu aparato aŭtomate notas ĉiun vian frapon de la klavoj kaj la ekzaktan tempon de la frapoj sur papero.

Unuvorte tiu aparato ŝajnas al mi ideala instrumento, necesa al ĉiu musikimprovizisto, kaj ankaŭ ideala kontrolo de muzikisto, kiu povas facile kontroli siajn erarejojn. Eĉ en konkursoj, ŝajnas al mi, tia ekzakta, surpapera kontrolo de la ludistoj estus ofte pli bona, ol la blinda juĝo de profesoroj, nur laŭ sonareco. Per komparo de tekstoj, oni povus ofte ŝanĝi sian juĝon...

Post bona kaj afabla akcepto de ges-roj J. Th. Boer, mi formigris de tie al Arnhem, kie mi parolis en la Esperanto-Domo. Mi konstatis, ke s-ro L. Moreau neniam perdas humoron, ĉiam estas gaja



BERGEN A.Z. : LA NEDERLANDA MARO



MUELILOJ APUD ALKMAAR

fraŭlino, kiun mi ekkonis dum la vojaĝo kaj kiu ne scias nian lingvon! Ŝi estis do ripozilo en mia pilgrima vojaĝo al Arnhem.

Arnhem! La urbo, kies regiono estas fama pro sia beleco, kun rimarkinda urbo-domo, la *Domo de Diablo*, kiel ĝi estis nomita; estas komprenebla, ke tie, kie estas *Domo de Diablo* devus esti kontraŭbalancilo kaj tiel pastro Cseh venis en tiun urbon kaj tie kreis ne *Domon de Anĝelo*, sed Esperanto-Domon por... anĝeloj!

Tien do devus ĉiuj pilgrimi por anĝeliĝi surtere...

Mi prenis taksion kaj veturis al Esperanto-aleo, scivola ekvidi tiun hejmon, pri kiu mi multe aŭdis kaj pri kiu mi multe legis.

Mi ne scias ĉu la agrabla veturo kaj vetero, la bela parko, la simpatia administranto, s-ro L. Moreau, kiu per sia vervo, malkaŝa sinteno kaj sincero tuj kaptas vin, — tiom bone influas vin, ke vi sentas vin hejme. Mi konfesas, ke la domo, la arango, ĉio faris al mi tre bonan impreson kaj mi povas nur gratuli, sincere gratuli la fondintojn de tiu *Unua Hejmo*. Pri la bona administrado mi estas konvinkita: ges-roj Moreau, simplaj, gajaj, laboremaj, tion certe faras bone, donante tutan sian talenton kaj kapablon al la dispono de tiu Hejmo.

Arnhem, la urba estraro kaj precipe la nuna urbestro de Hago, s-ro Salomon Jean René De Monchy, tiama arnhema urbestro, kiuj komprenis, ke tia Hejmo povas alporti multe da bono al la urbo meritas nian dankon.

Nederlandaj dometoj, — estas ĉarme vin vidi Vi ne simple staras, — vi ŝajnas eĉ ridi.

En Hago staras la Paĉpalaco. Palacon ni havas, sed mankas la paco

Ĉu vi scias, ke ekzistas ankaŭ feliĉaj esperantistoj? Kompreneble unuaviĉe en Ĉeĥoslovakio. Jen s-ro Francisko Knobloch, kiu gajnis en loterio senpagan vojaĝbileton per aviadilo de Praha ĝis Amsterdamo. Li opiniis plehumi esperantistan devon kaj veturis poste al Arnhem.

De Arnhem mi veturis al Hago, la ĉefurbo de la Internacia Cseh-Instituto de Esperanto kaj de la nederlanda registaro. Estas feliĉe troviĝi en malgranda lando, tio ebligas al vi ofte reviziti la urbojn. La samo okazis kun mi. Plurfoje mi venis por viziti ĝin.

Hago estas malnova urbo, ĝi ludis gravan politikan rolon. Jam en la dek-unua jarcento, tiu komence ĉasoloka rendezvejo de la reĝoj de Holando, fariĝas meze de la dektria jarcento ilia konstanta rezidejo. Kaj de tiu epoko kun nur tre mallonga interrompa periodo profite al Amsterdamo inter 1806 ĝis 1813, ĝi restis la ĉefurbo de la registaro.

El la internacia historio estas fama *Granda Alianco* de Anglujo, Nederlando kaj Aŭstrio en 1701 kontraŭ Francujo, kiu estis ĉi tie subskribita.

Multaj internaciaj arbitraj konferencoj tie ĉi okazis. Ĉi tie estas la sidejo de la Kortumo de Internacia Justeco. Mi opi-

La Cseh-Instituto troviĝas en bela domo kaj estas bone organizita. Tion cetere garantias al ni la nomoj de s-ino Isbrücker kaj de pastro Cseh. Tie troviĝas la redakcio kaj administracio de *La Praktiko*, tre bona monata revuo por lernantoj.

Tie en granda salono, plenplena de membroj de la haga grupo « Fine ĝi venkos » kaj de multaj gastoj mi parolis. Tie mi interkonatiĝis kun la vigla sekretariino de la grupo, f-ino J.E. Rijkers, kaj kun multaj, multaj aliaj membroj.

La grupo, kiun lerte prezidas s-ino Isbrücker, estas fervora, entuziasma. La grupa vivo pulsas.

Hago! Tie okazis nia unua postmilita Universala Kongreso. Tie la esperantistoj promenadis en la belaj arbaroj, kiuj ĉirkaŭas la urbon, vizitadis la muzeojn kaj ĝuis la belecon de multaj monumentoj kaj konstruaĵoj, plejparte el la moderna epoko.

Survoje al Rotterdamo komence en la plata pejzaĝo, estas multaj ĝardenistaj kampoj, pastejoj sur kiuj pastas sin diverskoloraj bovinoj, kaj ŝafidoj. Nur tie kaj tie vidiĝas kelkaj arboj en tiu nederlanda angulo. Ni proksimiĝas rapide al Rotterdamo, la granda haveno de Eŭropo, unu el la gravaj buŝegoj por la germana komerco. Jen dekstre malgrandaj ĝardenoj kiel en la regionoj de ĉiuj grandaj urboj. Fore arganoj kaj gruoj; kamentuboj de l'industria urbo. Sed maldekstren ni pli plezure jetas rigardon, ĉar ankoraŭ daŭras la silenta, trankvila nederlanda pejzaĝo...

Mi trakuras rapide Rotterdamon por iri

kaj entuziasma. Mi retrovis inter la publiko malnovajn konatojn el Stokholma Kongreso.

Sed ne longe mi restis tie. S-ro J. H. Vink, fervora kaj simpatia esperantisto el *Scheveningen* aranĝis aŭtoĉaran ekskurson el Hago al digoj. Li estis afabla kaj ne forgesis pri mi. Li telefonis kaj telegrafis, ke mi venu matene al Alkmaar kaj tie mi povos kunveturi al la digoj kun la karavana aŭtoĉaro. Dimanĉe matene, la 9-an de septembro mi forveturis el Arnhemo al Alkmaar.

Ni preterpasas arbaretojn, kampojn sen kanaloj, ofte ni trovas vastajn arbustojn. Pejzaĝo simila al regionoj en aliaj landoj. Kelkfoje pro la faŭno ŝajnas, kvazaŭ ni troviĝus en altaj montaroj. De Utreĥto ŝanĝiĝas la pejzaĝo. Reaperas la rektliniaj kanaloj, sur la kampoj pastas sin nigreblankaj bovinoj, temp-al-tempe aperas ankoraŭ saliko, poste montriĝas eĉ fruktogardenoj.

Ofte, kiam vi proksimiĝas nederlandan urbon vi konsterniĝas pro la multaj krucoj, kiujn vi vidas de malproksime sur la tegmentoj de la domoj. Sed venante pli proksimen vi konstatas, ke tio estas la radikantenjoj! Nederlando estas vere lando de la radio!

Mi trapasas Utreĥton kaj Amsterdamon kaj mi venas al Alkmaar.

ALKMAAR

Mi elvagoniĝas rapide kaj kuras al la stacidoma placo. Jen, la esperantoĉaro min atendas kun sia gvidanto Vink!

En Jamtlando

(DAURIGO)

Mi preskaŭ forgesis diri al vi, ke ankaŭ s-ro Szilagy estis. Pri la bonaj amikoj oni forgesas... sed ne ĉiam. Lastminute oni retrovas ilin.

Veran surprizon, agrablan, eĉ kortuŝan surprizon oni faris al mi.

Akompanis min al la stacidomo Johanson kaj Szilagy, kaj tien venis dudeko da kamaradoj el la Laborista Klubo kun Ernst Eriksson. Ke multaj agrablaj inaj vizagoj estis ankaŭ, estas klare. Svedaj deputitoj estas ĉiam ĉirkaŭitaj de belulina aro. Aŭ ĉu nur la esperantaj deputitoj en la persono de Ernst Eriksson?...

Se mi estus havinta ankoraŭ bankbileton (eĉ falsan!), mi certe elvagoniĝus kaj restus. Sed mian bileton pagis jam prunteprenita mono!...

Tial mi serioze devis foriri, foriri de la simpatia lando, kie la kulturo estas tre supera, kaj kie la popolo estas admirinda...

Kaj mi forlasas Stokholmon... kun la transira vizo de la germana legacio...

EN GERMANUJO

Jam surmare al Germanujo, la kelkhora vojaĝo flavigas multajn vizagojn; tiu-maniere ricevante visagkoloron de japano, ni farigas puraj arjanoj laŭ la fama protesto de japana ambasadoro kaj afabla oficiala germana respondo, kiu tuj arĝigis la japanan rason!...

La kontraŭvola marmalsano evidentigis al ĉiuj, ke ni forlasis demokratujon kaj ke ni eniras landon, kie ĉio estas enregimentigita...

Nu, tiom da uniformoj! Kaj tiom da flavaj floroj en la butontruo kaj tiom multekoste kompare al la sveda tero!

Uniformoj! Mi estis mirigita kaj konsternita! ses-jaraj buboj marŝas takte kaj laŭ kalcotaj rimoj! Kompreneble, ke inter la junularo troviĝas multaj adasistoj!...

Kaj kiom da hebreoj! Dio Mia! Mi pensis, ke jen la promesita tero!

Mi iris vespermanĝi. Mi havis bonan apetiton. Eĉ la ŝikaj (!) hitleraj uniformoj, faritaj de plej bonaj hebreaj tajloroj, ne forprenis al mi apetiton!

Mi demandis kelneron, ĉu oni eble prezentas en Hamburgo la faman esperantofilmon «Morgaŭ ni komencos la militon»? Li respondis, ke militon ni povas fari sen la hebreoj. Mi protestis publike kaj tuj citis al li, ke baldaŭ aperos hitleraj en esperanto. Mi eĉ aldonis, ke laŭ posta dekreto esperanto estos rekonita kiel arĝinta lingvo!

Nu, kompreneble, ke post dekretoj, eĉ banditoj fariĝas honestaj. Ankaŭ tiam mi rekonos esperanton!

La kelnero estis saĝa homo!

Mi aĉetis kelkajn gazetojn por legi ĉu okazas baldaŭ milito. Tio da uniformoj mi ne vidis eĉ en la milita epoko. Nun ne nur la plenkreskuloj, sed ankaŭ la tata junularo portas ĝin. Ĉio enregimentigita!

Ne estas ĉi tie la loko por paroli pri ĉio. Pri la socialistaj kunvenoj, pri la publikaj kontraŭregimaj diskutoj. Jes la germana popolo diskutas, parolas, kritikis spite la reĝimo. Tio estas fakto kaj tion mi konstatas kun plezuro! Estas pli facile elmurdi ĉiujn siajn amikojn, ol por ĉiam silentigi popolon, eĉ se ĝi amas la ritman marŝon de botoj.

Ne estas vere, ke la arĝaj membroj de Germana Esperanto-Asocio portas verdajn pantalonojn. Tion mi refutas! Sed estas vere, ke multaj antaŭaj arĝaj membroj fariĝas el la Asocio.

Mi konstatis, ke spite la ŝanĝo kaj hitlerigo de GEA, spite la tiom fame konata germana disciplino, la germanaj arĝaj esperantistoj ne estas tiom disciplinitaj. Vi volas ekzemplon? Jen, en Germana Esperantisto mi trovas fajrajn vortojn de kamarado Kurto Walther, la fama hitlera gvidanto de la esperanto-movado kontraŭ la eldonejo Ellersiek pro tio, ke ĝi kuragas meti sur la paĝojn de la gazeto anoncon pri Plena Vortaro de S.A.T.!! Kaj al sanktaj anĝeloj, s-ro Frederiko Ellersiek ne timas kaj ne forigis el sia katalogo suplemento la noton pri Plena Vortaro de S.A.T. Unuvorte okazas granda revolucio! Ni gratulas al li pro lia kuraĝo! Ni ne bezonas aldoni, ke ŝajnas al mi, ke s-ro Kurto Walther, la germana Adalberto Smit, ne

(1) neologismo, sed malfeliĉe trovebla en Plena Vortaro!...

En Nederlando

(DAURIGO)

Jam kelkajn personojn mi rekonas: s-inoj J.C. Van de Wetering- Meesters, B. Djik, f-ino Rijkers ktp.

Ni veturas al la ĉefplaco. Tie ni haltas. Admirinda estas tiu placo, kie ĉiuvendrede okazas granda, mondfama fromaĝa foiro.

Pitoreska placo kun sia kanalo, ligna, movebla ponto, kun domoj, ĉiu laŭ sia speco interesa. Oni sentas sin bone en tiu malnova urbo, kiu ekzistas laŭ kronikistoj jam de la sesa jarcento! Ĝi ludis gravan rolon en multaj danĝeraj fazoj de la nederlanda historio. Fama estas Alkmaar el la okdekjara milito kontraŭ la hispanoj, el kiu ĝi eliris venka (1573). Pasis jam jarcentoj kaj mi ekscias, ke ankoraŭ hodiaŭ oni festas tiun tagon de l'venko!

Ne longe ni restas por viziti la urbon kaj mi tre bedaŭras; mi sentas la antikvecon de la urbo kaj kun kia plezuro mi enprofundiĝus la purajn stratetojn por observi kaj vidi. Oni pli facile elportas la nunecon, kiam oni proksimiĝas al la pasinteco...

Ni haltis tie por admiri la fromaĝpesejon. Impona konstruo el deksepa jarcento kun turo alta je 52 metroj. La turo havas tre belan sonorilon, konsistantan el 35 sonoritoj. La plej malnova estas el jaro 1688, farita de antverpenano. Ĉiuhore, kiam la sonorilaro eksonas, rajdas en speciala alkonstruo de l'turo, sub la horloĝo rajdantoj kaj soldato trumpetas.

Sub la cifereplato mi legis tre pensigajn sentencojn en latina lingvo: *Singulas horas, Singulas vitas puta* (Pri konsideru ĉiun horon kiel vivon); *Vive memor leti*; *fugit hora* (Vivu pensante al la morto; la tempo kuras); *Dies extremus aeterni natalis* (La lasta tago estas la naskiĝtago de l'eterneco); *Pretiosissima jactura tempus* (La plej kara perdo estas perdo de l'tempo).

Sed mi ne havas tempon longe mediti super la motoj, kiujn mi rapide kopias. La dekunua jam longe pasis, ni vidis ja rajdantojn, ni aŭdis la sonorilon. Ni havas nur momenton por iri al kafejo. S-ro Vink, ĉiam vigla kaj bonhumora, nin pelas. Ĉu li eble tralegis la lastan sentencon kaj ne volas, ke ni perdu tempon? Li pravas, ni venis ne por viziti Alkmaar, ne por filozofe mediti super laj latinaj vortoj, kiujn certe la fromaĝistoj neniam legas; alie ili diskonus la fromaĝojn al malriĉuloj kaj revenus hejmen sen fromaĝo kaj sen mono!...

Estas strange, ke tiom pripensigaj frazoj troviĝas sur la fromaĝesejo de Alkmaar, konstruita en 1582 kaj renovigita en 1884. Kiu metis ilin kaj pro kio? Mi esperas, ke la simpatiaj alkmaaraninoj dum kelkaj vintraj noktoj studos la demandon, serĉos en la historioj pri sia urbo kaj la fromaĝesejo kaj iam ni ekscios pri tio!

Ni iras al kafejo, kies posedantino s-ino W. V. Schagen-Geritzen estas tre sindena esperantistino. Rapide ni trinkas la kafon por reveni sur la fromaĝesejan placon, kie atendas nin nia aŭtoĉaro.

Ni bedaŭras, ke estas dimanĉo kaj ke ni ne povas vidi la strangan foiron, kien venas homoj el la tuta lando, eĉ el eksterlando. La fromaĝoportistoj kun siaj multkoloraj ĉepeloj kaj portiloj, la eksterlandaj turistoj kun siaj okulvitroj kaj fotografaparatoj, ĉiu pli malbona ol alia, kaj finfine ankaŭ la fromaĝaj kugloj, certe kreas tre pitoreskan, vivan kaj gajan bildon.

Plaĉas al mi Alkmaar kaj mi ĝojas konstati, ke alkmaaranoj sciis bone eluzi la militan inteligentcon de siaj prapatroj, sed anstataŭ daŭrigi la fabrikadon de militkugloj, ili tute simple kaj konservative daŭrigis la fabrikadon de — packugloj.

Se en Hago la Kortumo de Internacia Justeco iam praktike volus solvi la problemojn, ĝi devus permesi militojn per la alkmaaraj packugloj!...

Tio pliriĉigus la urbon kaj la batalantoj havis sufiĉajn rememorojn eĉ el tia batalo. Ĉar la fromaĝaj packugloj de Alkmaar estas sufiĉe — malmolaj!...

Ni forveturas, sed la aŭtoĉaro ne iras rapide. Ĉu eble iu kunportas fromaĝkuglojn? Ne, tio estas la plena sako da kisoj, kiun mi kunportas por Baghy. Kiom oni

scias sufiĉe bone nian lingvon. Estas klare, ke tio ne estas kulpo de la eldonejo Ellersiek, kiu kavas bonegajn librojn.

Mi preskaŭ forgesus aldoni, ke «packontrakto» de Leipzig ne plu ekzistas... Jes, la batalo rekomenciĝas, feliĉe nur inter Germana Esperanto-Asocio kaj Nova Germana Esperanto-Asocio.

Unuvorte ĉio marŝas bone en Germanujo.

S. GRENKAMP.

ne faras por amikoj! Oni ŝargas sian konsienccon per gravaj zorgoj kaj sakon per kisoj.

Ni veturas al la digo ni veturas al polderoj!

LABORO DE TITANOJ

La historion, kiun mi rakontos, ŝajnos al vi nekredibla, ŝajnos al vi fabelo. La homa genio penas kaj luktas de jarmiloj kaj jarcentoj kontraŭ kruelaĵoj de la Naturo. Unu el la plej teruraj luktoj de l'homaro okazas kontraŭ la plej granda malamiko de la tero: la maro.

La nederlandanoj pligrandigis sian teritorion de pli ol 10% per konstanta lukto kontraŭ la maro kaj reprenado de la tera surfaco.

Arkoraŭ antaŭ kelkaj jaroj la Norda Maro enpenetradis per larĝa breĉo en la nederlandan teron. Tiu ĉirkaŭ okdek-kilometra interna profundaĵo nomiĝis Suda Maro (Zuyderzee). La origino de tiu golfo estas malbone konata.

Sed oni scias, ke ĉirkaŭ la jaro 1300 la Suda Maro alprenis la formojn, kiajn ĝi havis ankoraŭ antaŭ deko da jaroj.

La nederlandanoj penis per digoj haltigi la pluan akvan invadon kaj ili sukcesis. Sed fariĝinte specialistoj en la defendo de sia tero, kiu plej parte estas plimalalta ol la surfaco de la maro, — ili promesis al si repreni al la maro, kiom ĝi forrabis dum la pasintaj jarcentoj.

Imagu, kia kolosa laboro, kia eksterordinara plano kaj kia kuraĝo entrepreni similan realigon!

Tiu mirinda ideo, kvazaŭ fabela utopio, kaptis la mensojn de ĉiuj kaj la parlamento kun la senato decidis en 1918 apartigi per pli ol tridekkilometra digo la Nordan Maron de la Suda! La laboroj komenciĝis en 1919.

Estas neeble en mia babilado doni al vi bildon pri la giganta laboro kaj ĝia tiom rapida efektiveco!

En majo 1932, la ŝipsirenoj povis anonci la ĝojan novajon. La lasta truo estis fermita. La fantazioj fariĝis realaĵoj. La homa persistemo sukcesis. La naŭdekmetre larĝa digo ligas la provincon: Norda Holando — kun Frislando! La Suda Maro fariĝis — lago Ysselmeer!

Tio devis esti emoca minuto por la realigintoj de tiu tiom danĝera laboro!

Impona estas tiu digo! Rememore staras sur ĝi turo, kiun ni suriris. Malsupre troviĝas rememora tabulo kun jena subskribo: *Popolo, kiu rivis, konstruas por la estonteco.*

Imagu la grandajn oferojn, la grandajn kostojn de tiu sizifa laboro! Unu kilometro de la digo kostas ĉirkaŭ 4 milionojn da florenoj!

Sed ekzistas popoloj, kiuj scipovas almenaŭ pli saĝe uzi sian monon, ol aliaj, kiuj eluzas ĝin por armado.

Ankaŭ la revojaĝo tra la nova poldero *Virigen*, la unua sekigita teroparto de la Suda Maro estas impresa.

Por respondi al la ĝenerala deziro de la popolo, kiu volis vidi kiel eble plej rapide la rezultojn de tiu diga laboro, oni efektive gvidis samtempe la sekigadon de poldero apud tiam ankoraŭ insulo *Virigen*. Jam en 1930 oni gajnis tie pecon de tero havanta 20.000 hektarojn! La plej granda poldero de l'mondo!

Se vi pripensas, ke oni daŭrigas la laboron, ke oni studas la sekigon de tri aliaj polderoj kun surfaco de 41.000, 56.000 kaj 95.000 hektaroj, tiam baldaŭ Nederlando haves teron por pli ol 300.000 loĝantoj, kiuj povos bone vivi tie el la kampokulturo.

Vivi tie, kie hodiaŭ nur malgranda aro da fiskaptistoj pene vivetas.

Prava, tre prava estas la aŭtoro, kiu kreis la faman frazon: *Dio kreis la mondon kun escepto de Nederlando*, ĉar Nederlandon, kreas la nederlandanoj mem luktante kontraŭ la maro sende kaj elŝirante al ĝi la polderojn, kiujn iam ĝi englutis.

Kaj tiu lukto estas ĉiutage. Ĉiutage oni laboras kaj defendas sian malaltan landon kiu en sia plej granda parto estas sub la mara nivelo, kontraŭ la furiozaj ondoj de la maro!

L'espero, l'obstino kaj la pacienco

Jen estas la signoj per kies potenco

la nederlandanoj defendas sian teron.

Ni venas al *Hoorn*, kie okazas Regiona Kongreso de esperantistoj. Bela, antikva urbeto de 10.000 loĝantoj. Jam en la deksepa jarcento jarcento fama kaj riĉa. Eminentaj kuracistoj vivis tiam tie. Postrestaĵoj de fortikaj turo el dekkvara jarcento, multaj, tre belaj domoj, rimarkindaj pro sia kliniga konstruo. Bela ĉefplaco kun atentinda urbodomo. Ni nur ĉion rapide pretervidas dum tiu unuhora restado.

Ni foriras kaj trapasas serion da tre pitoreskaj vilaĝoj, kie la naturo estas riĉa, dometoj belaj kaj puraj, kie verda koloro regas sur la domoj kaj sur la apudvojoj bariloj, sur lignaj pontetoj kondukantaj aparte al ĉiu dometo. *Jen Edam,*

kie ni rimarkas kelkajn naciajn kostumojn en la rapida traveturo...

Mi forlasas la agrablan societon kaj estas danko al ili pro la interesa kaj instrua vojaĝo.

Mi trakturadis la landon kaj la urbojn tiomfoje tien kaj reen, ke mi perdis tro da tempo por la vagonaro kaj facile miksiĝas la bildo de multaj pejzaĝoj. Ne plu longe aŭ ne ĉiam mi memoras, kie la bovinoj estas flavruĝaj, kie nigraj... kie estas la kanaloj, en kiuj mankis akvo, kaj kie ili tute mankis...

Amsterdamo! Unu el la plej grandaj komercaj urboj de l'mondo!

Ĉu el vi legis jam multe pri tiu ĉefurbo de Nederlando. La plejparto de domoj estas konstruita sur enteraĵ fosto. La tero ĉi tie estas tro mola por trovi meti fundamentojn. Amsterdamo estas tratraĉita per tre granda nombro da kanaloj. Pli ol sescent pontojn ĝi posedas.

Urbo de pontoj, ĝi estas ankaŭ urbo de sorceriloj. Urbo de fama borso, ĝi estas ankaŭ urbo de la diamant-komercio.

La urbo estas defendata per speciala sistemo de fortikaĵoj kaj ĝiaj kluzoj povas inundi la tutan regionon.

Tio ĉiam savadis la urbon de la malamikaj armeoj de la pasinteco.

Krom la rimarkinda ponto de *Amstel*, Amsterdamo posedas multajn vidindaĵojn. Jen la malnova kaj nova preĝejoj; iama urbodomo, nun la reĝina palaco, estas unu el la plej karakterizaj konstruoj de Nederlando. Famaj muzeoj kun belaj, valoraj kolektoj de la holanda skolo.

Ankoraŭ en la dekdua jarcento eta fiskaptista vilaĝo, Amsterdamo post la forpelo de hispanoj en la deksepa jarcento fariĝis potenca urbo...

Patrujo de Spinoza, de naturalisto Svammerdam, de la mondvojaĝisto Tit-Sengt kaj de multaj famaj pentristoj: Van der Velde, Van der Neer, Salomon Koninek, Kario du Jardin, Van den Eeckhout, k.t.p. S-ro P.W. Baas, la prezidanto de la Nederlanda Societo «La Estonto» estas Nia, afable gvidis min tra la malnova kvartalo de la urbo, tra la pitoreskaj kanaloj, kie vi renkontas ofte malnovajn domojn el la dekkvara, dekkvina jarcento.

Se mi tiom vagadis tra Nederlando, tio okazis ĉefe dank'al la nederlanda societo «La Estonto estas Nia», dank'al ĝia prezidanto, s-ro Baas kaj ĝia ĝenerala sekretario E. de Wolf, al kiuj mi esprimas koran dankon.

Culemborg, malgranda, ĉarma urbeto kun siaj larĝaj aleoj havantaj grandajn arbojn, kun sia bela regiono plena de umaj estas konata pro siaj multaj fabrikoj de cigaroj kaj mebloj/Vigla grupo, kun juna prezidanto W. Grolleman, kun simpata sekretarino f-ino A. v. Arnhem.

Mi troviĝas en Betuvlando. Pri ĝi belan versajon faris s-ro W. Grolleman kaj volonte mi citas ĝin, anstataŭ mem pri-skribi la landon:

Kara nia Betuvlando,
Gojo vi de nia kor',
En river' de via rando
Speguligas bela flor',
Vivon donas via tero
Al la arb', kaj herb', kaj gren',
Ruĝa pomo, mola bero,
Rekomenc' por homa pen'

Vin trarandus la plugilo,
Frukto vi de la river',
Vin ja formis la argilo,
Kiu estas via ter',
Akvon bridas fortaj digoj,
Penlaboro de la hom',
Frataj estas niaj ligoj
Por la ŝirmo de la dom'

Regiono de laboro,
Nia kara Betuvland',
Via gren' similas oron,
De vin laŭdas nia kant',
Kien paŝos, nin la sorto,
Ĉiam ni memoros vin,
Sankta land' de freŝa forto
Dio ĉiam benu vin.

HILVERSUM

Urbo mondkonata, almenaŭ inter la esperantistoj, pro sia radiostacio. Fama ankaŭ pro tio, ke tie vivas la unua nederlanda esperanto-pioniro *Drees Uitterdijk*, kiu multe laboris por sukcesiĝi nian movadon en Nederlando. Aŭtoro de la unua lernolibro kaj de la unua nederlanda organo. Estis vera plezuro kaj gojo revidi nian malnovan amikon, ĉiam sindonan por nia afero.

Juraj, viglaj pioniroj: f-ino S.C. Visser, s-roj W.A. v. Dongen, Fr. v. Hest forte tenas la movadon.

UTREĤTO

En Utreĥto estas tre vigla esperanto-grupo. Inteligenta prezidanto: s-ro C.G. Driessen, fervora sekretario: s-ro E.A. Koot kaj ankaŭ la aliaj membroj certigas, ke la movado povas antaŭeniri. Mi admiris kun kia preteco la membroj de la grupo prenis sur sin la disdonon de dudek mil da propagaĵoj. Ne forgesu, ke estas vera

labore promeni tutan tagon aŭ eĉ pli de domo al domo por enleterkestigi la flug-felĉojn.

La kunvenoj estas tre vivaj. La grupo posedas eĉ kortegan jongliston en la persono de s-ro de Beus!...

Mi ne povas forgesi ankaŭ miajn simpatiajn gastigintojn, ges-rojn Sochting-van Voorthuysen, kiuj plenaj de entuziasmo preparas sin al ekzamenoj!... Jes, al ekzamenoj, la esperanto-ekzamenoj. En la tuta lando oni parolas pri la ekzamenoj!...

Nederlando estas ankaŭ la lando de l'esperanto-ekzamenoj!

S-ino Sochting-van Voorthuysen kaj s-ro Driessen promeniĝis min tra sia historia urbo.

Jen la Universitato, fama, malnova Universitato fondita en la jaro 1633, jen la Katedralo el la dektria jarcento kun centmetra turo, sur kiu troviĝas nun meteorologia observejo.

Tre industria kaj komerca urbo. Dum mia restado estis ĝuste malfermita la Internacia Foiro.

Utreĥto estis konata jam en la antikvaj, romanaj tempoj sub la nomo de *Frajctum ad Rhenum*, ĝi posedis jam episkopejon en la sepa jarcento kaj ni ĉiuj bone memoras el la historio, ke tie en la j. 1579 ligis sin la sep provincoj kontraŭ la hispana regado ke tie en la j. 1713 oni subskribis la paco post la milito de la hispana heredo.

Bela muzeo kun tre valoraj pentraĵoj de Jan van Scorel (1495-1592), fama pentristo de Adriano VI, kiu alportis al Utreĥto la arton de Miĥaelo Anĝelo kaj de Rafaelo, kun pentraĵoj de Bloemaert (1601-1672), kiu sekvas la skolon de sia majstro van Scorel.

En la nederlandaj urboj oni ne trovas ĝenerale multe da monumentoj, pro tio mi meracias la monumenton de prof. Donders, fama okulisto de tiea Universitato.

DEVENTER

Frapas vin la multkoloraj florbedoj laŭlonge de la stacidomo kaj la granda, bela parko kun lageto. Ni havas tuj la impreson troviĝi en dolĉa, agrabla urbo. Kaj vi ne miras, kiam vi poste ekscias, ke ĝuste Deventer estas konata kuk-urbo.

Eble la dolĉeco de la mielkukoj disradias tra la interesa urbo donante al ĝi specife agrablan aromon.

Mi konfesas, ke ne multe mi sidis en la komforta hejmo de ges-roj Bloemendal. Ili amas sian urbon kiel sian hejman neston kaj tuj ili volas montri al vi ankaŭ la urbon.

Kaj eble Deventer, dank'al miaj gastigintoj, estis la urbo, kiun mi plej detale vizitis kaj pri kies ekzisto kaj historio mi antaŭe nur tre malmulte sciis. Kaj kiom da aferoj, kiom da nova scio vi povas ĉerpi, se via akompanantino konas kaj amas la historion de sia urbo!

Mi sciis pri Deventer malmulte. Mi sciis, ke ekzistis iam iu fama *Hendrick van Deventer*, nederlanda akusisto, kiu vivis inter 1651 kaj 1724 kaj kiu postlasis faman verkon pri la akusiga arto, speco de lernolibro por akusistinoj! Mi sciis, sed tre nebule, ke ĝi estis hansa urbo. Jen ĉio!

Nur nun mi gustumis la bonajn mielkukojn, nur nun mi povis admiri la Katedralon el la dekkvina jarcento, viziti la tureton de la iama monfarejo kaj rimarkindan urbdomon.

Mi eĉ ne hezitis viziti la policejon, belan konstruaĵon el la jaro 1632. Kvankam mi montris tie mian pasporton, oni min ne arestis kaj nur tio ebligis al mi vidi ankoraŭ la urban pesejon kaj la domon de « Tri oritaj haringoj » el la deksepa jarcento.

Komprenoble mi vidis multe pli, sed mi ne povas pri ĉio paroli. Kaj se mi rakontus pri kalendaro, en kiu oni ĵetadis pune homojn, kiuj faradis falsajn monerojn, pri piaco, sur kiu estas ankoraŭ postsignoj de iam tie starinta eŝafodo, — tiam eble vi petus, ke mi daŭrigu la rakontadon pri tiuj pasintaj tempoj, kiam oni punadis tiujn, kiuj ĝin meritis!

BERGEN (N.H.)

De l'Oriento mi migris al nord-okcidenta parto de Nederlando al *Bergen (N.H.)*.

De Deventer ĝis Apeldoorn vi traveturas regionon plenan de ĉarmo. Floroj kaj senkanalaj kampoj, poste de Apeldoorn ĝis Amersfoort dunoj, pinarbaroj, sabloj, kaj ĉerpe kampoj, paŝtetoj kun nigreblankaj kaj flavruĝaj bovinoj *Amersfoort!* Patrujo de J. Olden Van Barneveldt! Historiaj rememoroj *Hilversum* pri kiu ni jam parolis. Oni revidas la rektliniajn kanalojn, la rozkolorajn domojn. Bela kanalo kun longa, arka ponto antaŭanonce *Amsterdamon*. Tie grandaj hebreaj tombejoj, tie trankvile paŝtas sin bovinoj.

Ni daŭrigas la vojaĝon. Malgrandaj muzeiloj inter la kanaloj, por elpompadi laŭnecese la akvon, salikoj bordas la vojaĝon, la kanaloj ĉi tie serpentumas kaj jen *Alkmaar*.

Mi kontinuas kaj alvenas al *Bergen*. Iom laca mi ĝojas renkonti amikojn ĉe la stacidomo.

Pascha, la aktiva delegito de U.E.A., la animo de ĉi tiea movado, kaj jen iom pli

malproksime ges-roj Granftdijk kun kelkaj aliaj membroj de la grupo.

Post formeto de mia valizo en la vilao « La Verda Stelo » de s-ro Pascha, mi kuras por viziti tiun urbon aŭ vilaĝon.

Belega ripozloko kun freŝaspektaj domoj kaj ĝardenoj, meze en arbara regiono. Agrablaj, ripozigaj aleoj kun tilioj, kverkoj, betuloj kaj fagoj. Paradizo en la senarba Nederlando. Tie supre devus rendevui ofte la nederlandaj esperantistoj.

Sino Graftdijk bonvolis min afable akompani tra la bonodora arbaro, tra la dunoj, tra la agrablaj, bone ombrajtaj aleoj de Bergen. Ne malproksime estas la marbordo.

Eĉ tiu norda loko havas rememoraĵon, rusan monumenton starigitan en 1901 memore al la rusaj falintoj en la milito de 1799.

Tie franca marŝalo Brune venkis la angla-rusan armeon.

En la esperanto-grupo mi havis la plezuron konatigi kun aliaj fervoraj membroj, i. a. kun finoj A. Jimmink kaj N. Vorst kaj retrovi dum mia paroladeto la membrojn de la alkmaara societo kun sia prezidanto s-ro Slinger.

Fino J.-B. Seckel meritis de mi specialajn dankojn. Se ne siaj instigoj, mi ne estus kuragiĝinta refari la vojon kaj de okcidente-norda ekstremo de la lando reveturi al la orienta limo de Nederlando!

Sed nun mi dankas al ŝi, mi estis kontenta refari la vojaĝon, revidi la muzeilojn kaj la bovinojn, kiuj ŝajnis al mi jam ĉeraj konatinoj. Mi estis kontenta revidi la pejzaĝon tra la tuta largeco de la lando kaj konstati, ke la nederlanda pejzaĝo ne estas tiom monotona kiel ĝi povus ŝajni al iuj.

Mi trovis multe da ĉarmo en la trankvila kamparo, kie tiom feliĉe vivas la bovinoj.

Carmis min la kanaloj kun la rebriloj de l'suno, carmis la ĉielo jen gaja jen malgaja, kiu ŝajnis esti jen alte jen malalte kaj kisi la fruntojn de l'akvo.

Carmis min la ombroj kaj lumoj, dank'al kies potenco la verda koloro de la kampoj estas ĉiam alia.

Carmis min la kokinejoj, la luksaj kokinejoj, kiujn ĵaluzus multaj malfeliĉuloj dormantaj subponte en grandaj urboj de Eŭropo. Kaj serioze mi observis, kiel la pejzaĝo ŝanĝigas pro la koloro de la bovinoj kaj kokinoj.

Mi povis revoki en tiuj momentoj la pasintecojn de tiu tero, kiu tiom suferis. Gajn-luktojn kontraŭ la akvo kaj kontraŭ la fremdaj konkerantoj.

Kaj Nederlando sukcesis venki siajn malamikojn. Ĝi venkis la akvon, ĝi venkis la invadintojn.

La popolo tamen gajnis ion el tiu lukto. La maro skulptis en ĝia animo la fortecon de la karaktero, la obstinon kaj la paciencojn kaj la sudaj invadintoj inokulis ĉe tiu popolo ion el sia propra animo: la bonhumorecon, la gajecon.

Jen nederlanda popolo kuniganta la ecojn de l'Nordo kun tiuj de la Sudo.

HENGelo

Industria urbo. Ing. Werner Krause kondukas min tra interesa parkurbo, apartenanta al la grandaj fabrikoj. Mi vidas, ke oni zorgas por la oficistaro kaj laboristoj, kvankam la krizon oni sentas.

La ekonomia krizo en Nederlando estas videbla. Multaj senlaboruloj en grandaj, industriaj regionoj. La mondmilito kaj la postmilitaj jaroj troindustriigis la landon. Nun, pro la tutmonda krizo kaj pro la rekonstruo de la industrio en la militintaj landoj, — Nederlando suferas.

La esperanto-vivo en Hengelo estas bona, dank'al saga kaj ofta-kunlaboro de la najbaraj grupoj.

Tio ebligis al mi vidi samideanojn ankaŭ el Almelo kaj Enschede en Hengelo.

La prezidanto *Scholle* de la hengela societo afable min akceptis. Mi konatigis en la grupo kun multaj, multaj, junaj kaj fervoraj samideanoj, kun s-ro Maagd, Vrolyk, kun entuziasma s-ino Krause-Kok, kun f-ino Klock.

Mi veturas al *Zulphen*, kuŝanta meze de ĉarna regiono. Mi frapas al la pordo de delegito de U.E.A. Kvankam estas bela, straradia dimanĉo, s-ro J.P. Soeters fervore plenumas siajn devojn: li atendas esperantistojn. Ni vizitas kelkajn interesajn monumentojn. Altiras min la *Granda Prejejo*, gotika konstruo kun interesa mezepoka preĝeja biblioteko interne. Ĝi ekzistas jam de la jaro 1561 kaj havas multajn librojn kaj manuskriptojn alĉenitajn al pupitroj. Poste *Baterhalo* el la jaro 1450-52 kun kurioza tegmentkonstruo kaj *Vindoma Turo* kun sonorilaro. Multaj vidindaĵoj el la dekkvara kaj dekkvina jarcentoj troviĝas en tiu urbo, sed mia vagonaro baldaŭ foriros. Mi devas rapidi.

Mi decidas reveni hejmen t. e. al Parizo. Ankoraŭ mi pasigos du tagojn en Rotter-

damo kaj mi atingos la ĉefurbon de Eŭropo, la urbon de l'humo!

ROTTERDAMO

Rotterdamo estas unu el la plej grandaj havenoj de l'mondo kaj la ĉefdelegitejo de U.E.A. por Nederlando.

Kiam ni ektelefonis al la agema ĉefdelegito *Jakobo Telling*, kiun hotelon mi eniru, mi aŭdis kvazaŭ amikan riproĉon. Ĉu ano de U.E.A. havanta jarlibron, bezonas ankoraŭ serĉi hotelon? Ĉu vi ne trovas ĝin en la jarlibro? Kaj mi iris al Hotelo de l'Eŭropo, ĉar ĝia adreso troviĝas en la jarlibro de U.E.A.

Ceokaze mi bedaŭrinde konstatas, kiel esperantistoj neniam sciis elprofiti tiom ofte venintajn ŝancojn por nia propagando, por la praktika eluzado de nia lingvo, de niaj organizoj. Unu el la plej gravaj servoj, la *turistan servo* oni tute neglektis. Guste post la milito, kiam diversaj turistaj oficejoj aperadis kiel fungoj post pluvo, la esperantistoj dormis. Kia granda kampo! Utila, praktika kaj profitdona!

Kaj la *hotela servo*! Tiom grava! La esperantistoj veturas tra la mondo, vizitas urbojn kaj landojn kaj devas kuri al fremdaj turistaj oficejoj por havi informojn pri hoteloj kaj restoracioj de la urbo.

Vasta kampo al prilaboro! Se eble ni revenos al tiu temo.

Dank'al la afableco de la Rotterdam Haven-Administracio kaj ĉefe de ĝia direktoro s-ro N. Th. Koomans mi povis viziti la mondkonatan havenon.

Mi eĉ havis agrablan surprizon: akompanis min en mia boatvojaĝo esperantisto, unu el la oficistoj de la Haven-Administracio, s-ro J.P. Van Dijk.

Dum mia pli ol dusemajna restado en Nederlando la suno brilis varme kaj mi estis mirigita konstati, ke miaj nederlandaj amikoj malgustis, kiam ili diradis, ke Nederlando estas nebula kaj pluva lando.

Nur la lastan tagon, la tagon de mia boatado en la haveno, la ĉielo fariĝis serioza, eble por ke mi ankaŭ pli serioze observu la vivon kaj la laboron en la haveno.

Rotterdamo estas granda haveno, pri tio mi sciis, sed mi konstatis, ke ĝi estas pli impona kaj pli grandioza ol mi imagis. Mi konstatis, ke la rotterdamo haveno ne senlaboras. La laboro daŭras senĉese. Seninterrompe ni renkontadus ŝipojn el ĉiuj mondpartoj, el ĉiuj landoj.

Fine de la dektria jarcento nur urbeto, Rotterdamo sukcesis jam en unu jarcento fariĝi granda urbo. Oni konstruas grandan katedralon kies turo ankoraŭ hodiaŭ dominas la urbon.

La urbo kaj la haveno disvolviĝas seninterrompe, nur la militoj de la dekoka jarcento haltigas la prosperon.

Sed ĉirkaŭ la jaro 1830 Rotterdamo refortiĝas kaj fariĝas centra haveno por la nederlandaj kolonioj.

La haveno de Rotterdamo ĉiam plibonigadis kaj modernigadis. Dank'al sia nova rekta rivera vojo al la maro, la sufiĉa profundigo de la rivero por plej grandaj ŝipoj, la rotterdamo haveno fariĝis grava centro por la plej grandaj transmaraj ŝipoj.

Sen kluzoj, sen pontoj, kun grandaj, modernaj basenoj, havantaj al sia dispono la lastmodernajn levilojn por plej rapida ŝargado kaj malŝargado de la ŝipoj la haveno apartenas al la plej komfortaj kaj oportunaj havenoj de la mondo.

Rotterdamo ludas gravan rolon ankaŭ por la transita komerco kaj trafiko. La Rejno, kiu ĉiam estis granda akva komunikilo de Okcidenta Eŭropo, estas navigebla ĝis Bazileo. Pli ol unu kvarono de la germana ekstera komerco pasas tra Rotterdamo. Pli ol la duono de la nederlanda importo kaj eksporto pasas tra tiu haveno!

Ne nur havenon posedas la urbo sed ankaŭ multajn altlernejojn kaj institutojn.

Patrujo de poeto Tollens, kies pura, eleganta stilo, plena de forto kaj digno havis tiom grandan influon siatempe, — de literaturisto Didier Erasme kaj de Van Hengendorp, la animo de la nederlanda sendependeco en 1813, — Rotterdamo meritis seriozan viziton.

La esperantista movado floras en tiu urbo. *Merkurio* kun sia prezidanto Ch. Kromziek multe laboras kaj efike propagandas. En ĉiuj pli grandaj centroj de la urbo oni lastatempe pendigis longajn tolbendojn kun anoncoj pri la kursoj.

La ĵurnalistojn oni invitis al hotelo « Atlanta », kie ĉeesto de s-ino Isbrucker kaj de pastro Csah, kiu mem faros la kurson, propagandefikis. La nelacigebla fervorulo Schmidt havas sur siaj ŝultroj la laboron de tiu propagando. S-ro J. R. Brakel ankaŭ ne ripozas.

En Rotterdamo mi havis la veran ĝojon proksimiĝi al la laborista movado.

La laborista esperanto-movado en Nederlando, estas tre forta, tre vigla. Ne malofte

mi renkontis sur la stratoj, en tramveturiloj de multaj urboj laboristajn esperantistojn.

La Federacio de laboristaj esperantistoj estas bona organizo. Oni konstatas, ke junaj, freŝaj manoj ĝin direktas.

La F.L.E. estas dividita en distriktojn. Prezidanto de la rotterdamo distrikto estas homo energia kaj kun fajra entuziasmo. Ne malplian havas k-do L. Boslooper, lerta sekretario de la rotterdamo distrikto.

Ĉiuj estraranoj ĉu k-ino L. Stiermann-v. Winden, ĉu k-doj C. v. Eesen, Felikso Kulik, W. Eerdmans, J. der Landen lasis al mi la plej bonan impreson kaj certan pri la denova antaŭenmarŝo de nia lingvo en la rotterdamo distrikto.

S. GRENKAMP.

VINTRO

Laŭ Internacia arto :
France : Mon beau sapin
Germane : O Tannenbaum
Angle : O winter Times

I

*Mi amas vin, mi amas vin,
Tre bela blanka vintro.
Sed kiam kota estas vi
Neniam vin ametas mi;
Mi amas vin, mi amas vin,
Se blanka estas ĉio.*

II

*Ho vintro vin, ho vintro vin,
Mi amas tute kore.
Ne nur la neĝon amas mi,
Sed la abion ankaŭ mi
Tre ĝojas ja, tre ĝojas ja
Rigardi longatempe.*

III

*Kaj kio pli, kaj kio pli
Ol tio estas bela?
Vi vidas ĵali ĉirkaŭ vi
Pulvoron blankan, pli kaj pli.
Abio vi, abio vi,
Kaj tamen restas verda.*

IV

*Abio vi, abio vi
Infanon feliĉigas
Ĉar dum Kristnasko estas vi
La ĝojportilo antaŭ li
Abio vi, abio vi,
De festoj estas reĝo.*

V

*Mi havas do, mi havas do
Al vintro grandan emon
Malnovaj zorgoj for de vi!
La neĝo pasas, restas vi,
Verdega jes, fortega jes
Simile al abio!...*

KERVAN.

ZAMENHOFA ESPERANTO
 Studoj pri Esperanto
TIA, KIA ĜI ESTAS
 en la « Fundamento » kaj en la verkoj de Dro Zamenhof.
 Dek 4-paĝaj numeroj afrankite :
 5 francajn frankojn per poŝtaj respondkuponoj aŭ mandato.
 D-ro Pierre CORRET
 197, Boulevard Brune, Paris, 14^e

Petu senpagan specimenon de
Internacia Medicina Revuo
 Ĉar la oficiala organo de
TUTMONDA ESPERANTISTA KURACISTA ASOCIO
 bezonas vian subtenon
 Ĝi estas la sola pure scienca gazeto en Esperanto
 Redakcio kaj administracio :
D-ro P. KEMPENEERS
 19, avenue Montjoie, Uccle 3 (Belgujo)
 Jarabono : 5,- svisaj frankoj aŭ egalvaloro t.e. 7,20 belgaj aŭ 36,- belgaj frankoj.

TRA LA GAZETARO

La simpatia kunfrato L'ESPERANTO (julio-aŭgusto) represis el *Nia Gazeto* la alvokon de generalo Bastien, sed forgesis citi tion. Laŭdante tre fiate nian raporton pri la Stokholma Kongreso ĝi ankaŭ forgesis afable noti ke la aŭtoro de tiu raporto estas nia ĉefredaktoro.

El ARGENTINA ESPERANTISTO (julio-aŭgusto) ni ekscias, ke en Argentino oni festis en la unuaj tagoj de julio la kvindekajn datrevenon de la starigo de la lego pri komuna edukado :

« Per tiu ĉi lego kies fruktojn ni ĉiuj guas hodiaŭ, la organizo de la publika edukado troviĝas ĉe ni, en tre efika situacio. Kompreneble, kaj tiu diro devus estis konsiderata superflua, ke granda estas ankoraŭ la plenumota tasko al tiu direkto en Argentino, sed ni konstatu ke malgraŭ la reganta krizo, oni ne perdas tempon nek esperon, por pliperfekti ankoraŭ tiun organizon, ĝis tie, kie postulu la necesoj, de la plej atentinda nacia fako.

Laŭ la nomita lego la edukaparato fariĝis en nia lando absolute sendependa de ĉiuj aliaj aŭtoritataj sferoj, ĉar oni kredis ke, tiel granda kiel estis la honoro de la homoj, kiuj troviĝas en tiaj delikataj postenoj, estas momentoj en la vivo de la popoloj, dum kiuj la registaroj pretendas utiligi la nomojn de tiuj personoj por influu la socion per ĉiuj rimedoj. La Konstitucio kredis, ke rilate al afero tiel grava por la Nacio, oni devis plene apartigi ĝin de ĉio, kio ne estas konsilinda por la racio, moralo, kaj la rajto, kiujn la Konstitucio garantias. »

SUR POSTENO estas komunista organo, kiun ni ĉiam legas kun rideto. La pompaj frazoj de tiuj kamaradoj kontraŭ la kapitalismo estas vere amuzaj ! La plej kapitalista ŝtato nuntempe, ŝtato, kies diplomatoj kaj altaj oficistoj veturas en plej luksaj aŭtomobiloj, kies ambasadorejoj akceptoj estas jam konataj pro la elstara lukso estas ja Sovetio ! Estus bone, se la marksismajn frazojn vi afable enmartelus en la kapojn de viaj ĉefoj, kaj de kelkaj viaj kamaradoj, kiuj ekz en Genevo loĝas en la plej elegantaj hoteloj !. Iom pli da ordo, kamaradoj, en via propra anaro ! Kaj dume, kiel fartas via popolo ? — Sed ni haltu, ni volis nur atentigi pri la duobla n-ro 23-24, en ĉiu aperis tre interesa artikolo de E. Drezen pri « Perspektivoj en la kampo de internacia normigo de sciencoteknikaj terminoj kaj simboloj », kvankam — ĝis nun *Sur posteno* eĉ ne notis la aperon de *Nia Gazeto*. Kaj tamen ni ekzistas... estas vere, ke ni ne havas *Lincoln* on !..

En SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN (aŭg-sept.) ni legas tre bonan kaj viglan raporton pri la okazinta Kongreso. Ni rekomendas ĝin al ĉiuj kaj speciale al s-ro Goldsmith por pripensoj...

LIGILO, monata esperanta revuo por ĉeĥoslovakoj (Prostějov, Vrchlického 18, Ĉeĥoslovakio) estas tre lerte redaktata revuo, sur bona papero kaj kun vere ĵurnalista talento. Kiu ĝin redaktas ? Tion ni ne sukcesis ekscii el la paĝoj de la tri n-roj, kiujn ni ricevis. Kaj domage, ĉar ni volis varme gratuli al la redaktanto(j) !

ANTACEN monata bulteno de la Esperantista Grupo en Dunkerque-Malo estas forta ligilo inter la membroj de la grupoj.

BULTENO de C.A.E. ĉiam vigle redaktata. Ni ankaŭ kore bondeziras al Bouska kaj E. Kuhl, la malnovaj, meritplenaj pioniroj de nia afero en Ĉeĥoslovakio, okaze de ilia 50-jara datreveno. Ke ili vivu longe kaj alportu ankoraŭ kelkajn brikojn al nia movado !

HEROLDO DE ESPERANTO en sia n-ro de 1^a 2 septembro pri parolas nian ĉefartikolon *Monopolemo* aperinta en nia aŭgusta n-ro kaj opinias, ke ĝenerale ni pravus. Dankon !

Ni tamen ne tute komprenas ĝian frazon : « ne estas monopolemo, se oni protestas kontraŭ nia aŭgusta kursgvidanto ». Ĉu ni iam le aĵn rekomendis laŭdi sentaŭgulojn ?

Kaj nun pri la konkurenco ! Pri kia « malinda » konkurenco parolas Heroldo ? Ni atentigas de « Heroldo » klarajn frazojn. Ni ne emias la diplomatan, « miskomprenan » frazaron. Ĉu ekzemple redaktoro Jung opinias « malinda » konkurencon, kiun li faris al antaŭ Heroldo ekzistintaj gazetoj ?

Ĉu « Heroldo » opinias, ke aperigante librojn kreinte libro-eldonejon kaj per tio riskante « ruinigi bonan verkon de dum jaroj kaj jardekoj laboritaj pioniroj de nia afero, tio ne estas morale defendebla » ?

Se *Heroldo-eldonejo* havas tian juĝon pri si mem, ni komprenas, ke ĝi simile juĝas pri aliaj !

« Vivi kaj lasi vivi », kara kunfrato. Volonte ni ripetis tiun malnovan arĥaigintan germa-

nan devizon, kiu en Germanujo ne plu havas rajteckziston.

Kaj pri la *interna ideo* ! Ni tute konsentas kun « Heroldo ». La interna ideo ne estas identa kun aliaj internaciaj lingvo-projektoj, sed ĝi estas *identita kun esperanto* ! Kaj pro tio esperanto venkis, kaj pro tio ĉiuj proponoj de « Heroldo » unuecigi la « internaciajn lingvojn » ne sukcesis kaj ne sukcesos. Pro tio « Heroldo » tiom facile tuj povus akcepti alian projekton de lingvo internacia kiel solvon de la problemo. Ĉu mi rediru, kion diris Zamenhof kaj ĉiuj liaj eminentaj disĉiploj. Sed jen aŭdu, kion diras via konstanta kunlaboranto P. B. el Budapeŝto :

« Certa estas, ke oni vane provas forlasi la « internan ideon », la entuziasmigilon, el la movado. Ĝi unuflanke estas esenca parto de esperanto, aliflanke *sen ĝi oni ne povus* kapti multajn seriozajn, daŭrajn adeptojn. La veraj esperantistoj grandparte estas aŭ fariĝis idealistoj kaj *tial laboras* — eĉ se kelkaj flanke havas ankaŭ ian malgrandan avantaĝon : ĉu modestan gajnon, ĉu eblecon korespondadi, vojaĝi, kolekti, legi eksterlandajn verkojn, amikiĝi tra la mondo, aŭdi kaj kompreni alilandan radion, k.t.p. *La ĉefa instigilo estas en la koro*, ĉu konscie, ĉu subkonscie. La monro da centoj da reklamoj, prospektoj, praktikajloj, bone impresas, sed malofte loĝas praktikulon, ke li mem lernu kaj uzu esperanton.

Oni do *serĉu la idealistojn* kaj propagandu inter ili, tiamaniere oni akirus adeptojn similajn el la unuaj jardekoj. Kaj unu idealista laboranto valoras pli multe por la movado, ol dek praktikuloj.

Esperanto *prezorgigas la animon*, gvidas al homamo, *servas al la homaro*, se ne ĉe miliojnoj, do ĉe centoj kaj miloj ! »

Fine, HEROLDO (23 septembro) publikigas privatan leteron de s-ino Julia Isbrucker al s-ro Privat. Ĉio estus en ordo, se ĝi ne enhavus ĉefan historian malĝustajon, kiun ŝajne la granda amikeco blindigis. Estas malĝuste, ke s-ro Privat fondis UEA kun Hodler. Ĉar estas Rousseau, Charles kaj Hodler, kiuj fondis UEA.

LA FOLIO bulteno de la esperanto-grupo de Malmö montras al ni, kiom entuziasma societo ĝi estas.

THE BRITISH ESPERANTIST (oktobro), kiu nun estas bedaŭrinde nur modesta bulteno ne perdas tamen humoron. Sub la rubriko *Edziĝo kaj Fianĉiĝo* ĝi notas la okazintaĵojn, sed sub la unua, ĝi ne gratulas. Ĝi opinias, ke jam sufiĉe, ke la anoj geedziĝis. Al la junaj gefianĉoj ĝi gratulas, ĉar ili ankoraŭ estas revemuloj. Aŭ ĉu oni gratulis escepte al s-ro Sturmer, « kies intereso kaj laboro por esperanto estas rekonataj eĉ de personoj nesimpatiantaj al li » (laŭ lia propra opinio) ? Ni profitas ankaŭ la okazon por lin gratuli plej kore.

EL BELGA ESPERANTISTO (oktobro) ni ekscias, ke en Belĝujo ekzistas nun *Esperanto-Domo* (Willemsstr. 21, Antverpeno), kreita de la « Belga Esperanto-Instituto ». Ni povas sincere gratuli al niaj belgaj amikoj kaj nur deziri bonan maŝon al tiu nova entrepreno.

EL BELGA ESPERANTISTO (novembro) ni ekscias kun vera plezuro, ke nia amiko d-ro Kempeneers estis elektita prezidanto de Belga Ligo Esperantista. Plej koran gratulon. Ni estas certaj, ke sub tiu juna energio la belga movado povas esperi progreson.

Nia kolego Jaumotte informas nin, ke li estis elektita la trian fojon, por du jaroj, ĉefsekretario de la Generala Belga Asocio de profesiaj ĵurnalistoj. Plej kore ni gratulas. Tio cetere ne ŝanĝas, ke la artikolo de s-ro Bastien ne estis iu ajn oficiala deklaro, sed simple artikolo. Kaj ankoraŭ unu opinio : kiam oni envas al oficialaj rekonaj aŭ honoraj oni simple flatas ĉiujn. Tion ni ne faras.

LA SOCIALISTO, oficiala monata organo de la Internacio de Socialistaj Esperantistoj (septembro) Centra Redakcio : F. Chamarre, « Le Gabut ». La Rochelle (Francujo). Jarabono : laŭ landa tarifo. En Francujo fr. fr. 10.

La socialista movado ne mortis, ĝi pruvas sian vivantecon. Spite la kvazaŭmortaĵ batoj en Aŭstrio, spite formorto de Ferdinand Seidl, eminenta pioniro de la laborista movado kaj tre talenta redaktoro de la antaŭa « La Socialisto », — la socialista mondo revetigis.

Feliĉe, kara kunfrato, ke niaj « plej studataj temoj havas kun politiko nur tre malnetan ligilon », ĉar alie la — politikaj esperantaj gazetoj ne havus ion por skribi...

Parolante pri la neŭtrala movado vi metas la vorton « neŭtrala » en krampetoj kaj vi bone faras. Sed, se la t.n. neŭtrala movado mismarŝis ĝi povas multe danki al — vi. Ne eksaltu ! Jes, al vi socialistoj. La eminenta diktatoro, la zorganto pri la kapitalo Hodler, pri la unua esperanta radio-stacio (kio okazas kun ĝi ?), pri la « redaktado » de « Espe-

Korespondado

Unu anonco ĝis kvin linoj kostas 2,50 fr/k. Ĉiu plia linio, 1 fr/k.

Mallongigoj : L = leteroj, PK = poŝtkartoj, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, ES = esperantaj stigmatmarkoj, EG = esperantaj gazetoj.

AGAPO estas amika rondo en Partizo sen prezidanto kaj sen kotizo, kie oni parolas esperante pri ĉio krom politiko kaj kie oni ĉiam invitas simpatian propagandiston. Ĝiaj tagmanĝoj okazas ĉiulunde je la 12-a en Restoracio Chartier, unua etaĝo, 124, Boulevard de la Chapelle, apud stacio Barbès-Rochechouart.

SENDU TUI al Carl Johanson, Poŝtfako, Aneby, Svedlando, ilustritan poŝtkarton (bildflanke afrankita aŭ poŝtmarkojn el via lando, kaj li tuj rekompencos vin per tia(j) bela(j) el Svedlando.

ĈU VI SERCAS facilan scenan bagatelajon por Judi en via grupo ? Ni rekomendas al vi la komedieton de Balucki (Grenkamp), *Kuzeto*. Nur tri aktoroj estas necesaj 10 ekz. de *Kuzeto* kostas nur fr. fr. 10, — Ricevebla ĉe *Nia Gazeto*.

PER ESPERO AL DESPERO de d-ro Schulhof. Kelkaj ekzempleroj de tiu poemkolekto jam delonge elĉerpita estas riceveblaj ĉe *Nia Gazeto*. Prezo : fr. fr. 3,50.

OKAZO ! Unu nova ekzemplero de la *Plena Vortaro de SAT*, unua eldono, vendebla je la prezo de fr. fr. 40, — kaj ankaŭ unu nebone broŝurita, ekz., sed kun apartaj kartonkovrioloj (mankas antaŭparolo) nur je fr. fr. 20 — ĉe *Nia Gazeto*.

DEK DIVERSAJ ESPERANTAJ GAZETOJ je prezo de fr. fr. 3, — (du respondkuponoj) riceblaj ĉe *Nia Gazeto*.

APERIS TRADUKO de Alfred de Musset, *Mimi Pinson*, tradukita de M. Rethel. Prezo fr. fr. 6, — afrankite Mendebla ĉe *Nia Gazeto*.

S-RO DRONCHAT jam ricevis tre interesajn sciigojn de nia samideano s-ro L. de Lang Eversten kaj li ĝi korege dankas.

ASTROLOGIISTO deziras korespondi kun samprofesianoj aŭ lernantoj, kiuj povus doni al li detalojn pri la ago (influo) de novaj planedoj Neptuno kaj Pluto (precipe pri fizika kaj sociala ago). Skribu al s-ro Moreau, 13, rue Colonie, Parizo (Francujo).

DEZIRAS Korespondi per L. Pk. kun gesamideanoj en Anglujo kaj Italujo. — F-ino M. Courmeaux Mourmelon-le-Petit, Marne, Francujo.

SENPAGE sendas al vi la 48-paĝan, dukoloran, ilustritan katalogo de LITERATURA MONDO la Administracio de *Nia Gazeto*.

Ĝi enhavas inter aliaj specialan oferton pri la

Zamenhofs tago 1934

GRANDAJ PREZMALALTIGOJ

validaj por mendoj, faritaj plej malfrue la 15-an de decembro 1934. Post tiu dato mendoj estos plenumataj nur laŭ la malnovaj prezoj.

Julio Baghy : Danca Marionetoj.....	3.80	1.45
Jean Forge : Mr. Tot aĉetas mil okulojn.....	4.40	1.85
Francisko Szilagyi : Trans la Fabeloceano.....	3.30	1.85
Frederiko Karinty — L. Totsche : Vojaĝo en Faremidon (nur broŝ.)	1.32	0.72
K. R. C. Sturmer : El la Notlibro de Praktika Esperantisto.....	2.75	1.45
Salom As — Izrael Lezerovitz : La Sorĉistino el Kastilio.....	3.85	1.85
Kolomano Kalocsay : Lingvo, Stilo, Formo.....	3.30	1.50
Kolomano Kalocsay : Eterna Bukedo.....	9.90	4.80
Goethe — Kalocsay : Romaj Elegioj.....	2.20	1.20
Dante — Kalocsay : Infero.....	9.70	4.80
Ludoviko Totsche : de Paĝo al Paĝo.....	2.75	1.45
Eŭgeno Aisberg : Fine mi komprenas la radion.....	5.—	2.40

Ĉiuj prezoj por broŝuritaj libroj. Por binditaj libroj oni devas aldoni por ĉiuj libroj po 1.— svfr. En la unua kolono staras la ordinara prezoj, en la dua la malaltaj, en svfr. afrankite.

Minimume mendebla kvanto lavaloro de svfr. 3.— Mendojn plej malfrue ĝis 15-a de decembro akceptas *Nia Gazeto*.

ranto » ktp, ktp, estis neniu alia ol via partiano, ol membro de la « Svisa Socialista Partio », kamarado Privat III..

Artikolon pri la 26-a Kongreso enhavis SKARABORGAREN (15/8).

ROZHLEDY, gazeto por literaturo kaj arto, eldonata de ĉeĥoslovakaj eldonistoj, enhavas longan artikolon de J. Šupichová pri la esperanta gazetaro.

La ĉefverko de Selma Lagerlof

Gösta BERLING

esperantigita de Stellan Engholm

Kiu legos verkojn de Selma Lagerlof, devas unue legi *Gösta Berling*. Ĝi estas la ŝlosilo de multaj el ŝiaj postaj verkoj.

552. paĝoj. Luksa papero.

Prezo : broŝ. ff. 25, — tole bind ff. 30 afrankite.

Aliaj verkoj de Selma Lagerlof : eldonitaj en esperanto :

La mono de Sinjoro Arne fr. fr. 6.—
La infanoj de Betlehem • 3.—
La junulino el Stormyr • 6.—

Afrankite ricevebla ĉe *Nia Gazeto*

Aperis la fama socia verko de

TEODORO HERZL

fondinto de la juda nista movado

LA JUDA ŜTATO

provo de moderna solvo de la juda problemo en la traduko de

Bernhard Selzer

Eldonas LITERATURA MONDO, Budapeŝto.

Formato 20x13,5 cm., 128 paĝa, kun klisita kovrilo. — Prezo : broŝurita sv. fr. 2,50, bindita sv. fr. 4.—, +10 % por sendkostoj.

AELA-anoj ricevas la libron por 40 % de la vendoprezo

Memoru, ke niaj kunuloj estas amo, paco kaj vero, — kaj niaj principoj — egaleco, frateco kaj libereco, — kaj kun tiaj kunuloj kaj kun tiaj principoj ĉio estas efektivebla !

V.N. DEVJATNIN.

En nia fideleco kuŝas la fundamento de nia unueco, de tiu unueco, kiu donas la fortecon.

VAN DER BIEST.

Imprime par la Société An^{me} L'Eclaireur de Nice et du Sud-Est

Le Directeur-Gérant : GEORGES AVRIL

